

445
..3.1988
KONGRESA BULTENO



KONGRESA BULTENO

aldono al »ILUSTROWANY KURYER CODZIENNY« al n. 182.


Redakcio, Administracio kaj Ekspedicio
Kraków, str. Karmelicka, l. 16.
Telefona 1198.
Ĉefredaktoro kaj eldonisto *Maryan Dąbrowski*.

Prezo de Nro:
10 helerojn.

La „Kongresa Bulteno“ eliras ĉiutage dum la kongresaj tagoj je la 6a horo vespere.
La redaktanta Komitato: *Leono Zamenhof, L. Kronenberg, E. Pfejfer, A. Czabryński, Mędrkiewicz* kaj *Laura Schleichkorn*.

Nr. 1. KRAKOVO, DIMANĈE LA 11. DE AUGUSTO 1912. Nr. 1.

Estu bonvenintaj!



La Kreinto de Esperanto
Dro L. L. Zamenhof.

El trankvila laborejo de modesta kaj juna Zamenhof eliris antaŭ jaroj paca verko: Esperanto. Komence ĝi estis mokata kaj elridata, poste kontraŭbatalata, poste mortigata per la silento, sed la potenca verko kaj ĝia grandega ideo venkis ĉion; kiel antaŭ la supreniranta suno malaperas la nuboj, tiel ankaŭ antaŭ la forto de l' Espero malaperis ĉiuj baroj kaj kontraŭstaroj.

Malgranda komence verko, subtenata de ĉiam pli granda aro da neforgeseblaj laborantoj, kreskis ĉiam pli kaj pli, ĉiam pli kaj pli enradikiĝadis en la korojn kaj cerbojn tiel, ke nune ĝi regas milojn da plej veraj gesamideanoj.

Kaj jen 25-a datreveno de Esperanto. Jen la jubilea, unua jubilea, nia kongreso.

Krakovo, spirita metropolo de Polujo, akceptas nunjare nian anaron. Krakovo, urbo de la sama tero, sur kiu nia Majstro vivas kaj sur kiu nia Esperanto unuajn siajn paŝojn komencis.

Do estu bonvenintaj, niaj gesamideanoj. Estu bonvenintaj Vi, niaj fratoj kaj fratinoj ĉiunaciaj, estu bonvenintaj kaj salutataj vi, niaj karaj samcelanoj, estu bonvenintaj Vi, niaj tutmondaj kunlaborantoj.

Krakovo, la sidejo de polaj reĝoj, Vin kore salutis. Krakovo, la ĉefurbo de la nacio, kiu ĉiam scipovis ŝati la sinoferon por ia ideo, kiu ĉiam scipovis estimi laboron.

Estu bonvenintaj, karaj gesamideanoj! Estu bonvenintaj por nia unua jubilea kongreso. Eble jam ne venos la dua nia jubilea kongreso, ĉar tiam nia ideo, nia Esperanto, ne apartenos jam nure al esperantistoj, sed al la tuta mondo.
Ke tiu ĉi tempo kiel eble plej baldaŭ

alvenu, ni arigadu la fortojn kaj senlace laboru.
Kaj dume sonu ĉie ĉiam pli kaj pli potence nia voko:
Vivu Zamenhof!
Vivu Esperanto!
Vivu internacia kompreniĝo de la popoloj.
La Redakcio.

Granda Salono „Stary Teatr“ (Malnova Teatro).

Lunde 12^a de Augusto okazos

Jubilea Festvespero

Szayer (Ada Sari), opera kantistino; Stanisława Wysocka drama art.; S^{ro} Wiktor Biegański art. dram.; „Krakova vira horo“ sub dir. de S^{ro} W. Barabasz kaj S^{ro} Wallek-Walewski; Orkestro de 100 reg. inf. sub dir. de S^{ro} kapelestro Sitter.

1. *Chopin*: Polonezo A-dur. Orkestro 100 reg.
2. a) *Wallek-Walewski*: „Jubilea kantato“ vortoj de A. Grabowski, Krakova horo kun orkestro sub dir. de aŭtoro.
b) *Antikva pola kanto*: „Gaude Mater“ horo „a capella“ dir. de S^{ro} W. Barabasz.
3. *Solena parolado*.
4. a) *Karłowicz*: „Senluziĝo“.
b) *Niewiadomski*: „La sorto de Joĉjo“.
c) *Moniuszko*: „Spinistino“, kanto sole S^{rina} J. Szayer (Ada Sari) akompanado S^{ro} W. Walewski.
5. *Deklamo*: S^{ro} Wiktor Biegański, art. dram.
6. a) *Żeleński*: „Nia Hanka“ krak. vira horo.
b) *Moniuszko*: „Kozako“ krak. vira horo.
c) *Moniuszko*: „Batal-kanto“ krak. vira horo.
7. *Deklamo*: S^{ino} Stanisława Wysocka, art. dram.
8. a) *Żeleński*: „Revo de l' knabino“.
b) *Gall*: „Serenado“.
c) *Karłowicz*: „Serenaj tagoj“ — kanto sole de S^{ino} J. Szayer (Ada Sari).
9. *Moniuszko*: „Popolkantoj“:
1) Macjek, 2) Ebenigu Dio, 3) Donu al mi Jasio, 4) El hejm' fordonis nin patrino
5) „Fajr-eligu hufumetoj!“
10. a) *Moniuszko*: Mazuro de l' opero „Halka“.
b) „La espero“ hejmo esperanta, Orkestro 100 r. i.
Komenco je 8^{1/2} horo vespere.

* * *
Malsupre ni citas la tekston de la kantoj, kantotaj dum la Jubilea Festvespero.

Jubilea kantato.

1. Feliĉa la semanto estas,
Kiu printempe semis grĉnon,
Kaj ĉn aŭtuno fĉstas
Dĉ bĉnikol't solĉnon.
Feliĉa, kies kcr'
Pri grĉnda verko rĉvis,
Kaj al la rĉvo flĉr'
La frukton elrĉvis.
2. Arbĉto, kiun Majstro kara,
Vi plĉntis ĉe Vistul' rivĉr',
Elkrĉskis ĝis lazuro klĉra,
Etĉndas brĉntojn ĉirkau ter'.
Sub ĝi kolĉktis milojn
La jubilea nova sent',
Kaj ligas tĉrofilĉin
Neutrĉle fundĉ resonas.
3. Dankĉme la Majstron kronas
Per verdo laŭfolia.
En niaj koroj, grĉnda hom',
Starigis monumentoj!
Benĉta Via nom',
Ĝi vivos tra jarĉntoj!

Antoni Grabowski.

1. Macjek.

1. Kun batil'ĉe zono iras Maciek voje,
Iatempe kantas „tim-di-rim-di“ ĝoje.
Se iu baras straton,
Ricevas kapobaton.
Oj da, dana!
2. Ho ve! malsaniĝis Macjek nia kara,
En drinkej' ne estis dum vespero kvara,
Jam al ni ne kantetos,
Bieron ne aĉetos.
Oj da, dana!

3. Mortis Macjek, mortis, venis lia horo,
Pacon la eterna donu Di-sinjoro!
Li estis brava viro,
Ĝis lasta sia spiro.
Oj da, dana!
4. Nia Macjek kuŝas sur kverka tabulo.
Se muziko ludus, saltus limortulo;
Ĝar Mazuro, anim' forta,
Moviĝas, kvankam morta.
Oj da, dana!

2. Ebenigu Di'.

Ebenigu vi
Montojn, valojn, Di',
Ke estu tut-ebene.
Gvidu, ho Sinjor',
Lin al mia kor'
Dimanĉe, frumatene.
Malgraŭ la dimanĉ'
Lacigu, fianĉ',
Vian ĉevaleton voje.
Estas mia kor'
Plena de dolor'
Kaj plendas mi malĝoje.

3. Donu min al Jasjo.

1. Donu min al Jasjo, mia patrineto!
Plaĉas al mi ringoj ĉe lia zoneto.
Oj dana!
2. Plaĉas al mi ringoj, koloro liphara,
Do min edzinigu, patrineto kara!
Oj dana!
3. Diru al mi, kion vi eldiri volas,
Ĝar mi ĝin ne scios, se vi ne parolas.
Oj dana!
4. Edziĝu, edziĝu, vi bonfartos frato,
Havos vi amadon, plendoj pri malsato.
Oj dana!

4. El hejm' fordonis min patrineto.

El hejm' fordonis min patrineto
Al fremdaj homoj, en fremda land'!
Kaj ŝi proponis, kaj ŝi ordonis
Sep jarojn resti for!

5. Fajr-eligu hufumetoj.

Fajr-eligu, hufumetoj!
Indas tion knabinetoj.
Ĝis, ĝis, ĝis maten'.
Se ne indas ĉe knabino,
Kalkanfrapu ni sen fino.
Ĝis, ĝis, ĝis maten'.
Frapu vigle per botetoj,
Ŝtalaj estas hufumetoj.
Ĝis, ĝis, ĝis maten'.
Ke eligu fajreroj,
Frapu vigle per botetoj
Ĝis, ĝis, ĝis maten'!

6. La Kozako.

Muziko de St. Moniuszko.

1. Sur monteto tie staras verda la acero,
Mortas juna la kozako sur la fremda tero;
Do sciigu la pendumo venas vivo-fino.
2. Kaj alvenis la patrino, venis patrineto,
Turnis palan la vizaĝon kontraŭ la fileto:
Ho, fileto mia kara, devis vi perej,
Ĝar ne volis vi konsilojn de l'patrin' obej.
3. Mi vin petas, patrineto: bele enterigu,
Oni batu sonorilojn, orgenon ludigu;
Sed ne gvidu min al tombo pastroj nek
[diakoj,
Nur en teron ukrainaj metu min kozakoj.

Esper. A. Grabowski.

La simboleco de l'esperantismo.

Dudek kvin jaroj forflugas de la momento, kiam unuafoje aperis esperanta libro. La tempo de ĝia apero estis tre malfavora, ĉar ĝuste unu el antaŭaj provoj de la solvo de la problemo de lingvo internacia estis en la zenito de la triumfo kaj de la disvolvigo. Juna, nova projekto ne povus mortigi la konstruaĵon, por kies grandeco laboris multe da centoj de batalantoj. Se tamen malgraŭ la malfavora opinio de la publiko, malgraŭ la malfavora opinio de la publiko, al kiuj unua libro estis sendita senpage, malsuprenigante ĝian aŭtoron en la mizeron, malgraŭ multe da baroj, kontraŭstarantaj sur la vojo al brilanta celo, ĝi atingis hodiaŭan staton de la disvolvigo kaj enigis en la moderna kulturo, kiel unu el la potencaj faktoroj de la progreso, — tio efektive pruvas, ke ĝi ne estas bazita sur opinio de unu homo, sed ke ĝi havas radikojn en sociaj tendencoj de la disvolvigo.

Kaj efektive, se ni pli proksime rigardos ĝian strukturon, ni vidos, ke ĝi ne estas laboro de unu nur persono, dependanta de ĝia volo kaj opinio. En Esperanto ni vidas laboron de multe da centjaroj, la vortaron vere internacian, ĉar internaciaj estas la akiraĵoj de la vera progreso. Ni tie trovas la terminaron grekan, ellaboritan de la pensuloj de tiu lando, same kiel de aliaj kulturoj de aria elemento, kiuj donas la eg-

zemplon al aliaj racoj, eĉ tiel malproksimaj kaj havantaj propran antikvan kulturon, kiel japanoj kaj ĥinoj. Kial do vidi en Esperanto la laboron de unu persono, se li (Zamenhof) nur estis genia kristaligisto de la vortaro, per ĉiuj nacioj ellaborita, kristaligante ĝin en unu lingvo, kvazan muzeo de la terminaro vere internacia?

Kial ne vidi tiun grandan simbolecon, kiu respeguliĝas en Esperanto? La lingvo estas standardo de la kulturo, en ĝi enkorpiĝas la vivo de nacio. La legendo pri turo Babel klare montras la gravecon de la lingvo, kiel homa komprenilo. La plejgranda malbono, kiun oni povas fari al la homoj estas malebligi al ili la interkompreniĝon reciproke. Se sekve tiu lingvo havas tian gravecon, se en ĝi respeguliĝas la nacia spirito kaj se ĝi estas kvazaŭ la standardo de tiu lingvo, — ĉu vi ne vidas la simbolecon de Esperanto?

Ĝi ja estas la lingvo helpa, dua lingvo krom la nacia, por interkompreniĝi kun la fremduloj, — tio signifas, ke supre de diversaj naciaj kulturoj ekzistas ankoraŭ io komuna por la tuta homaro, liganta ilin reciproke.

La helpa lingvo estas nomata Esperanto. Tiu nomo ne nur devenas el la pseŭdonimo de ĝia aŭtoro, ĉiam vivanta en la espero, sed ankaŭ protijo, ke ĝi enfermas en si la esperon de tuta homaro, kiu malgraŭ la diversaj baroj atingos epokon de la paco kaj de la fruktodona reciproka helpo en la laboro per subjugi la naturon al la homa influo, kio estas esenco kaj celo de la kulturo.

La signo de la Esperantistaro estas stelo. La stelo, kiel la matenruĝo akompananta tagiĝon, estis ĉiam la simbolo de ineniganta vivo. Stelo, kiel la signo kaj standardo de la kulturo estas anoncigo, ke la homara historio ĝisnuna estas kvazaŭ la preparo al tio, kio nune venos kaj kio estos pli esenca, pli potenca ol tio, kio forpasis. Esperanto direktas la homajn pensojn en la estontecon, kie ĝi vidas la oran epokon de la naciaj kulturoj, sintetizantaj en unu harmonio.

Neniam esperantismo celas forpuŝi naciecon. Tute kontraŭe, — ĝi substrekas la naciajn tendencojn, ne permesante superregni unu kulturon per la alia, sed ilin egalgradigante.

Antoni Czubryński.

Polujo.

Okaze de la Oka interesigos sendube la esperantistaron kelkaj sciigoj pri la tero, sur kiu nia lingvo kaj ideo festas sian unuan jubileon. Krakovo, urbo de la Oka, tute ne estas vera ĉefurbo de Polujo, ĉar ĝi estis la sidejo de polaj reĝoj nur ĝis la dekseca jarcento.

Vera ĉefurbo estis de tiu ĉi tempo Varsovio (Warszawa), hodiaŭa granda urbo pola. Ĝi kalkulas hodiaŭ 867000 da loĝantoj, kun proksimaj komunumoj 1,100.000. Dua urbo estas pola „Manchester“ — Łódź (Lodzo), kiu en la jaro 1840, estis ankoraŭ vilaĝo, kaj nune ĝi estas jam grandega urbo industria, kalkulanta ĉirkaŭ 600.000 da loĝantoj.

Tiel Varsovio, kiel ankaŭ Łódź kuŝas en nuna Królestwo polskie (Pola Reĝlando. Tria laŭ grandeco urbo pola estas Leopoldo (Lwów), ĉefurbo de Galicio, do de tiu ĉi parto de la antaŭa Polujo, kiu apartenas nune al Aŭstrio; ĝi kalkulas 212.000 da loĝantoj. Kvara urbo estas Vilno, ĉefurbo de Litovujo, kalkulanta 185.000 da loĝantoj, kvina estas Poznań (germane Posen), ĉefurbo de granda samnoma Duklando, apartenanta al Germanujo. Poznań kalkulas 180.000 da loĝantoj. Sesa urbo estas Kraków, enhavanta 156.000

da loĝantoj, kaj kun la urbo Podgórze (Podguje) ĉirkaŭ 180.000 da loĝantoj.

Krakovo estas unu el la plej antikvaj urboj de meza Eŭropo, ĉar ĝi estas fondita en oka jarcento, kaj en la deka ĝi estis jam la sidejo de polaj princoj. Krakovo estas tria vice urbo de meza Eŭropo, kiu ekposedis universitaton.

Post la fondiĝo de Sorbonno en Parizo Eŭropo ne havis novan universitaton. Ne pli frue ol en la jaro 1348 la Karolo IV fondis universitaton en Praha, en la jaro 1363 en Vieno, kaj preskaŭ samtempe, ĉar en la jaro 1363 fondis la pola reĝo, Kazimiro la granda, universitaton en Krakovo, kiu tutan dekkvaran kaj dekkvinan jarcenton ĝuis grandan popularecon en tuta Eŭropo.

Al fremdlandanoj oni devas klarigi ke la universitaton fonditan de la reĝo Kazimiro, kompletigis per la medicina fakultato la reĝo Vlad. Jagiello en la jaro 1410. En la 1900 jaro festis la Polujo kvincent-jaran datrevenon de la universitato, kiu estas nomata laŭ la nomo de la refondinto. „Jagiellona“. En la aŭstria imperio estas Kraków la vice sepa urbo laŭ multeco de loĝantoj. Ĝi sekvas post Vieno, Budapeŝto, Praha, Triesto, Graz, Leopoldo. Krakovo estas unu el la ĉefaj aŭstriaj fortikaĵoj; la Krakova militistaro enhavas 10000 da homoj. Akademio de Sciencoj, troviĝanta en Kraków, estas la sola sur pola tero. La Krakova episkopo dependas rekta de Romo.

Krakovaj konstruaĵoj, kiujn vi vidos en la centro de la urbo, inter la rondiranta plantĝardeno, devenas grandparte el 13, 14 kaj 15 jarcentoj. Kiam la Polujo perdis sian politikan sendependecon, restis Krakovo ĝia spirita metropolo. Kaŭzo de tio estas, ke en tiu ĉi parto de antikva Polujo, kiu apartenas nune al Aŭstrio, regas plej granda nacia libereco. En Krakovo konserviĝas la antikva kulturo de Polujo, tie ĉi estas plej vigla movado literatura, nacia kaj socia. En lastaj tempoj fariĝas Kraków ĉiam pli kaj pli ankaŭ urbo komerca; plej bona pruvo de tio estas, ke sole dum lasta jaro oni fondis en Krakovo 9 filiojn de unuarangaj Vienaj bankoj.

LOKA KRONIKO.

Krakovo, Dimanĉe la 11. de Aŭgusto.

Ĉiujn manuskriptojn, presigotajn en

„Kongresa Bulteno“ oni petas lasadi

ĉe S-o Kronenberg en Komerca Akademio

(Ĵurnalista ĉambro).

Redakcio kaj Administracio de „Kongresa Bulteno“ troviĝas ĉe str. Karmelicka 16. en la redakcio de „Ilustrita Kuriero ĉiutaga“ (Ilustrowany Kurjer codzienny). N-ro de la telef. 1198. Horoj oficaj de la Redakcia Komitato ĉiutage de 2-a ĝis 6-a.

„Kongresa Bulteno“ estos aĉetebla ĉiutage en centra oficejo kongresa (Komerca Akademio), en administracio de „Ilustrita Kuriero“ (str. Karmelicka 16), ĉe kolportistoj kaj en gazetagentejo de Hopcas ĉe strato Szczepańska. Unu numero kostas 10 helerojn. Kongresa Bulteno forlasados la preson je 6-a vespere.

Nia Majstro alvenis Krakovon vendrede 9-an de aŭgusto je la 11'45 nokte kune kun sia familio. La Majstron atendis en la stacidomo grupo da Krakovaj kaj eksterlandaj esperantistoj, venintaj al la Kongreso. La Majstro enloĝiĝis en „Pensione de Famille“ (domo apud la akceptejo).

Senpagaj muzeoj por la kongresanoj. La Krakova urbestro donis al ĉiuj kongresanoj la rajton de senpaga eniro al ĉiuj

Krakovaj muzeoj (Nacia Muzeo, Barbakano, Muzeo de grafo Hutten-Czapski, Muzeo de princoj Czartoryski, turo de preĝejo de Sankta Mario). Laŭ la sama decido de la Krakova urbestro ĉiuj kongresanoj rajtas uzi senpage tramojn dum la kongresa semajno t. e. inter la 11.—18. de aŭgusto. Oni montru al la konduktoro sian kongresan karton. Tio sufiĉas.

Piede de Parizo ĝis Kraków. Sinjoro Devjatnin (Ruso) kaj So Romano (Turko), kiuj la duan de julio eliris el Parizo kaj iris piede ĝis Kraków, estis hieraŭ akceptitaj de Krakovaj esperantistoj, kiuj iris renkonti ilin. La renkontiĝo okazis en vilaĝo Łobzów (4 km. malproksime de Kraków). La piedirantoj estis tie kinematografitaj de Krakova reprezentanto de la firmo Pathé Frères. Ĉirkaŭ la 5-a horo Soj Devjatnin kaj Romano alvenis Krakovon.

Kraków ornamita por la Kongreso. Ju pli proksime estis al la tago de la malfermo de l' Kongreso, des pli ĝojige aspektis por esperantistoj okuloj ĝiaj stratoj. Malgraŭ la konstanta pluvo, kiu daŭris du lastajn tagojn antaŭkongresajn, ĉiam pli kaj pli oftaj estis la esperantistaj flagoj, aŭsoj kaj insignoj, eligitaj el la balkonoj, fenestroj kaj en multaj vendejoj. Precipe ornamita estas strato Floryńska (proksime de la stacidomo, kondukanta al Rynek). La urbestro de Kraków surgluis sur la muroj de la urbo oficialan alvokon, subskribitan de vicprezidanto Dro H. Szarski, altirantan la atenton de la domposedantoj en Krakovo je la kongreso kaj postulantajn ornamadon de iliaj domoj.

Enloĝiga sekcio komencis jam sian agadon en la stacidomo en speciale por tiu celo aranĝita oficejo. Tiu sekcio laboros en la stacidomo tagnokte, senĉese, ĝis la mardo.

Oficialaj delegitoj al la Kongreso. Al ĝenerala sekretariejo alvenis hieraŭ oficialaj sciigoj pri la elsendo al Kongreso de la sekvanta delegito: el la ministraro de la milito kaj landa militistaro: subleŭtenanto Gostomski el Krakovo; Adalberto Kraus el Praha kaj el Bohema Nacia Konsilantaro; Henriko Fišer el Galac, delegito de la agrikultura ministraro en Rumanujo, de la Komerca ĉambro el Galac; fine Henriko W. Hetzel, delegito el la stato Pensilvanio. Pluaj aliĝoj esperataj hodiaŭ.

Krakovaj tramoj kursadas hodiaŭ belege ornamitaj per Krakovaj naciaj kaj internaciaj flagetoj. Tion ĝi ni dankas al la tre favora por ni trama Direkcio.

Ruĝa standardo verkita de Bolesław Czerwiński, tradukita de esperanta poeto Stanisław Karolczyk eldonita de socialistoj-esperantistoj, kantota dum popola kunveno esperantista 14. VIII. 1912 antaŭtagmeze apud Krakova Parko, kostas 30 h.

Komuna fotografado. Morgaŭ dimanĉe je la 5^{1/2} vesp. okazos komuna fotografado de ĉiuj esperantistoj. Kunveno de monumento de Mickiewicz sur ĉefplaco. De tie ni iros por fotografado al **Vavel**. Fotografos oficialaj fotografistoj kongresaj S-oj Gargul kaj Pierzchałski.

Aparte estos fotografataj kongresaj grupoj por la poŝtkartoj, kiuj kelkajn horojn poste estos disvendataj en akceptejo.

Raŭto de la partoprenantoj de la Kongreso okazos dimanĉe 11 k. m. vespere post la malfermo de la Kongreso, en la Pafista Societo. Tiu raŭto, celanta recipokan interkonatiĝon de la kongresistoj kaj prezentadon de la aŭtoro de Esperanto, okazos je la kostoj de la Kongresa Komitato, helpata de la Urbestro, dum kiu la partoprenantoj de la Kongreso pagos po 2 kronoj. Komenco de la raŭto je 9^{1/2} vespere.

Akva festo sur Vistulo. 14 de k. m. laŭ ĉiuj esperoj estos plej bele aranĝota. Fondita komitato laboras persiste kaj baldaŭ anoncos la programon. Momente ni ekscias, ke inter artaj fajroj aperos imponanta frontono fajra kun la inicialoj de Esperantista Kongreso, Konsiderante, ke en la mondo enradikiĝis la opinio, ke la Sokola

(*Falko*) institucio estus nur la bohema afero kaj ekstere de la Bohemoj ne ekzistas samgradaj gimnastikaj societoj — Krakova Sokolaro montriĝos per la nombro de la bildoj, prezentantaj la agadon de tiu nia nacia institucio. Sokolo estas parto ne nia nacia stato de posedaĵo. Manifestacio de tiu akiraĵo de nia kulturo antaŭ la alvenantaj gastoj estas tre trafa kaj necesa.

La ekspozicio kaj esperanta Muzeo. Ĝiuj krakovaj firmoj, kiuj surgluis en la urbo aŭsojn esperante, bonvolu alsendi po du ekzempleroj por la esperanta ekspozicio (Komerca Akademio II-e al Sro Weinstein). Tio estos bona reklamo por la firmoj, kaj samtempe ili estos enarhivigitaj en Esperanta Muzeo.

Prezentado de „Mazepa“. Komunaj teatraj provoj de la artistoj, partoprenantaj en la prezentado de Mazepa jam komenciĝis 9. de k. m. kaj daŭros ĉiutage ĝis la tago de la spektaklo. Ĉefaj roloj en la spektaklo estos luditaj de Sinjorinoj: Wysocka (Amelja), Krysińska (Kastelanino, kaj de Sinjoroj: Sosnowski (Vojevodo), Stanisławski (Mazepa), Maryński (Zbigniev), Jednowski (la reĝo), M. Węrzyn (Ĥmara), Biegański (kuriero), Nowakowski (Ĥonstka). Krom suprecititaj personoj partoprenos en la prezentado geartistoj de la Lvova opero kaj dancos polonezon en akto I.

Pri la absoluta korekteco de la lingva flanko de l' prezentado zorgas nia sperta samideano Jan Mędrkiewicz. Artistoj kaj artistinoj perfekte ellernis siajn rolojn, preskaŭ parkere, kaj oni estas certa, ke prezentado estos senripoĉa. Dum lasta provprezentado ĉeestis Sinjoro Antoni Grabowski mem por doni lastajn indikojn.

Kunveno de Esperanta Psikistaro troviĝas ĉe Rynek 43. Unua plena kunsido okazos lunde je la 10 a matene, fotografado je la 12 a. Dua kunsido marde je 7^{1/2}. Dum tio ĉi okazos eksperimentoj de internaciaj medioj. Intima kunveno okazos vendrede je la 9a vespere. Estas prezentotaj eksperimentoj spiritismaj, hipnotismaj k. t. p. En la kunvenejo trovas sin riĉa ekspozicio.

Varietea Teatro. Hodiaŭ sabate je la 8a vesp. okazos en Teatro de novaĵoj (str. Starowiślna 21.) prezentado varietea en Esperanto. Programo: 1. »La Espero«, kantata de la horo, 2. »Kial la Oka okazas en Kraków«, aŭ »La Krakova delegito«, kanto de preĝejo almozulo, 3. »Kiel okazas kunsido de Rajtigita Delegitaro« parolota de hina samideano. Kiel ceteraj punktoj de la programo sekvas la kantoj, dancoj kaj aliaj amuzaj. Biletoj po 4 K 40 hel., 3 K 30 hel., 2 K 20 hel., kaj 1 K. aĉeteblaj la tutan tagon en la Kongresejo (Komerca Akademio) kaj de 6a vesp. de la teatra kaso. Al la gesamideanoj, vizitontaj Teatron de novaĵoj, ni deziras plej bonan amuziĝon.

Pola gazetaro pri Esperanto Okaze de la Oka preskaŭ tuta pola gazetaro dediĉis iom da loko por nia afero. Memkompreneble la Krakova gazetaro estis por ni pleje favora. De kelkaj monatoj oni povis jam legi en ĝi longajn artikolojn pri nia movado; oni ne devas aldoni ke tiamaniere nia ideo estis plej bone propagandata. Speciale favora por ni montriĝis »Ilustrowany Kurjer Codzienny« (Ilustrita ĉiutaga Kuriero) kiu pro tio devas esti kiel eble plej multe subtenata de la polaj esperantistoj. En la lasta numero de »Nowości ilustrowane« (Ilustritaj novaĵoj) ni vidas longan artikolon pri Esperanto, ornamitan per kelkaj belaj fotografajoj. El la Krakovaj gazetoj tri eldonas hodiaŭ numerojn, enhavantajn artikolojn pri Esperanto: Goniec poniedziałkowy (Lunda Kuriero), Gazeta poniedziałkowa (Lunda Gazeto), kaj Kurjer Codzienny (Ĉiutaga Kuriero). Flanke ni aldonas, ke en Krakovo forlasadas la preson 113 diversaj gazetoj; inter ili 5 ĉiutagaj polaj kaj unu ĉiutaga hebrea.

Malantaŭ la cara krado. Unu el la kamaradoj, kiu sukcesis post longa mallibereco elŝirigi el tiu ŝtona tombo, kia estas la cara malliberejo, alportis al ni la sciigon, ke en la Varsovia malliberejo sidas de longe laboristo Stefan Hieniĉ, kroato devenanta el

la komunumo *Lika*. La tuta »Krimo« de tiu nomo konsistas en tio, ke li posedas nenian lingvon, krom la kroata kaj ke li havas nenian pasporton. Malgraŭ ke la oficistoj, se ili estus bonvolemaj, povus kompreni la lingvon kroatan, tamen ili skribas nek al la vilaĝestro de la komunumo, kiuj Hieniĉ citas sed alkalkulas lin al la kategorio de vaguloj (brodiag) ĉar por tiu krimo atendas lin longtempa mallibereco (katorgo). Hieniĉ elmigris en la carlandon, serĉante laborenspezon, ne sciante kio povas tie al li okazi. Ni komunikis kun la vilaĝestro S. Boljeĵnik, ke li volu interveni por klarigi tiun aferon kaj eltiri tiun mizerulon el la sangaj ungegoj de barbara registaro.

El krakovaj legendoj.

(Legendo pri Drako Olofagus.

Kun kastelo Wawel estas ligitaj diversaj legendoj. Jam la nomo Wawel mem, kiu estas ŝanĝita nomo Babel montras, ke ĝi ludis ian rolon en la kulturo, ĉar la nomo Wawel — Babel oni trovas ne nur en Mezopotanio sed ankaŭ en aliaj landoj egz. Rusujo, kaj sufiĉas preni la registron geografan de iu ajn atlaso por konstati kiel multfoje renkontiĝas tiu indo-europa nomo Babel-Wawel.

En la interno de Wawel — oni diras, ke loĝas slava juĝanto de mortintoj Rugewit, greka Minos. Tie vivas ankaŭ la mortintaj polaj reĝoj.

En la apuda kaverno, en kiu prehistoristoj trovis nenian restaĵojn vivis antaŭ ia legenda tempo, — Drako, nomata de unu el la unuaj historistoj Kadłubek Olofagus, tio signifas „Ĝiunganĝulo“, kiu minacis al la laĝantaro. Du fratoj de la kastelestro, ekdecidis ĝin mortigi, sed ne povante tion efektiviĝi senpere, ili faris tion perfide, nome ili jetis al la Drako bovajn ledojn ŝtopitajn per la sulfuro kaj la kalko, dank al kiu Drako ekflamis kaj mortis. Sed unu frato elviante al alia la gloron kaj trouheredon mortigis lin, dirante ke la frato estis formanĝita per la Drako dum la jetado de bovajn ledojn. Kiam la popolo eksciis pri la vero ĝi felpelis lin.

Al la kadavro de la Drako alflugis la korvojn kaj el ilia grakado oni nomis la kajstelestron **Krakus** (kraki-pole **krakać**) korvo-pole **kruk**, kaŝube **krak**, kaj ilian urbon **Krakuv**.

Similan legendon oni rakontas pri la masonistoj de la turoj de preĝejo de Sta Virgulino staranta sur la ĉefplaco. Ambau varbis unu fraulinon. Kies turo estos pli alta, tiu ŝin ricevos. Unu frato autavidante, ke li ne atingos la altecon de frata turo, ekdecidis lin morti. Tial alia turo estas plimalsupera. La mortigilon oni surpendis en Draphalo apud la enirejo flanke de monumento de Mickiewicz. De nove la legendo pri du fratoj.

Tiu rakonto havas komunajn radikojn kun aliaj mitoj. „Holofagus“ — estas detruita vorto de norda **vulf**, **Wolf** — **lupo**, kiun mortigas du fratojn, el kiuj unu postvivas la alian, simile kiel en roma mito pri Romulus kaj Remus, el kiuj la unua postvivas duan, simile en la legendo pri Kastor kaj Pollux el kiuj dua postvivas unuan, simile en litova legendo pri Lelum kaj Po-lelum.

En roma legendo lupino estas nutrantino de ambau fratoj, en krakova ŝi estas la objekto de kontraubatalado, ŝanĝita en Drako, kiu troviĝas en multaj hindo-europaj legendoj kaj ankaŭ en Ĥinujo sur la standardo. En la fondo de litova **urbo Vilno** — ludis ankaŭ rolon fera lupo.

Fratoj estas verŝajne konstelacio de gemuoj, per kiu komenciĝis la jaro 4.000 antaŭ nia ero, kaj kio lasis postsignojn en la mitologio.

Samideanoj sciantaj legendoj pri la Drako kaj lupo bonvolu sciigi min (plejbone skribe) — ĉar mi volas kolekti la

sufiĉan materialon por solvi tiun kompare —mitologian problemon.

A. Czubyński.

Klarigoj kaj informoj.

Pri aŭstria monsystemo. La aŭstria monunuo estas unu krono = 1 K = 100 heleroj. Bankbiletoj ekzistas po 10, 20, 50, 100 kaj, 1000 kronoj. Krom tio ekzistas ankoraŭ oraj moneroj po 10, 20 kaj 100 kronoj.

Mona tabelo:

1 K = 1 frs. 05 ct. = 0 M. 85 f. = 0 Rs. 39½ kop. = 8 d. = 21 cendoj amerikaj.

1 fr. = 96 hel.

1 M. = 1 K 18 hel.

1 Rs. = 2 K. 53 hel.

1 sh. = 1 K 20 hel.

1 dol. = 4 K. 93 hel.

Krakovaj tramvetuviloj. En Krakovo kursadas 4 tramlinioj, signitaj per ciferoj de 1 ĝis 4. La plej grava linio estas signita per Nr. 1 kaj ĝi kursadas inter stacidomo — ĉefplaco — Grodzka — Podgórze. Ĝi trapasas ĉefajn stratojn de nia urbo. La „duo“ kondukas de Podgórze (survistula ponto), tra strato Starowiślna apud ĉefa poŝtoŝtacio al parko Krakowski. La „trio“ kondukas de Zwierzyniec al strato Długa tra Rynek. La tramvagonoj, signitaj per „4“ kondukas de Rynek al parko de Dro. Jordan preter la Akademio Komercia. Aliloke ni rimarkas, ke la veturado per tramveturiloj dum tuta kongreso estas por la kongresanoj senpaga.

Pri fiakroj: Por vojaĝo fiakra unuĉevala en kiun ajn lokon en Krakovo oni pagas 60 helerojn. Por vojaĝo dum unu horo oni pagas 2 kronojn.

Pri poŝtmarkoj kaj afrankado de poŝtendaĵoj. La ĉefaj specoj de poŝtmarkoj estas po 5, 10, 20, kaj 35 heleroj. Poŝta tarifo: Por leteroj enlandaj, pezantaj maksimume 20 gramojn, oni pagas 10 helerojn kaj por poŝtkartoj aŭ vidaĵkartoj 5 helerojn. Tarifo al eksterlando estas 25 heleroj por leteroj kaj 10 heleroj por poŝtkartoj. Por sendaĵoj rekomendataj oni alpagas 25 helerojn.

Telegramo enlanda kostas por 10 vortoj 60 helerojn. Al Francujo oni pagas por la vorto 16 helerojn, al Britujo por la vorto 23 helerojn, al Italujo por la vorto 14 helerojn. Krom tio oni pagas aparte takson de 60 heleroj.

Tarifo por presajoj kaj gazetoj. Por enlandaj 3 heleroj ĝis 50 gramoj, 5 heleroj de 50—100 gramoj, 10 hel. de 100—250 gr., 20 hel. de 250—500 gr.

Por eksterlandaj oni pagas por ĉiuj 50 gramoj 5 helerojn.

Cigaroj kaj cigaredoj. En Aŭstrio ekzistas ŝtata tabaka monopolo kaj oni povas aĉeti tie nur cigarojn kaj cigaredojn fabrikitajn en ŝtataj fabrikejoj. La prezoj estas jenaj:

Por cigaredoj: Damen 4 hel., Kaiser 4 hel., Memphis 5 hel., Damen 6 hel., egiptaj 7 hel.

Por cigaroj: Cigarillos 5 hel., Rosita 8 hel., Virginiosa 8 hel., Cuba 11 hel., Trabuco 18 hel., Britannica 20 hel.

Memkompreneble ni citas nur la plej gravajn specojn de cigaroj kaj cigaredoj.

Programo.

Sabato. 8^a vesp. Varietea prezentado (Teatro de novaĵoj ĉe str. Starowiślna).

Dimanĉo. 9^a matene. Kunveno de Germana Esperanto-Asocio en Komercia Akademio III. 10^a mat. Elekto de naciaj delegitoj. Internacia instituto de Esperanto (S^o Privat): Ekzamenoj. 3^a tagm. Inaŭguracia kunsido de la Kongreso en Malnova Teatro. 9^a vesp. Komuna festmanĝo (Salono de „Pacifista Societo“ angulo de str. Lubicz kaj Bosacka).

Lundo. 9^a mat. Malferma kunsido de

U. E. A. en Komercia Akademio II. Fakaj kunsidoj de Germ. Esperanto-Asocio, katolikoj, liberpensuloj, teknikistoj, ĵurnalistoj en Komercia Akademio III.

11^a mat. Fakaj kunsidoj de maristoj, teozofoj, farmaciistoj, ruĝkrucanoj en Kom. Akademio III.

2½ tagm. Faka kunsido de kuracistoj, instruistoj, juristoj, bankistoj, poŝtistoj, komercistoj.

3½ tagm. Labora kunsido de la Kongreso en Malnova teatro.

La akceptejo kun apartenaĵoj troviĝas en Komercia Akademio I.

Ĝiuj fakaj kunsidoj okazas en Komercia Akademio III. La kunsidoj de T. E. K. A. okazas en Salono de „Kulturista Societo“ str. Radziwiłłowska 4.

Telegramoj el la Mondo.

El Aŭstrio.

Vieno. (tel. propr.) El Pilsen oni sciigas ke la admiralo Montecuccoli rigardis la laborojn de la armilejoj en ĉi-taj fabrikejoj „Skoda“. En tiuj ĉi fabrikejoj estas konstruataj armilejoj 34 kaj 36 centimetraj, anstataŭ 30 centimetraj ĝisnunaj.

Memmortigo de la deputato. (propr. tel.) Deputato al hungara seĝmo Aleksandro Popovics, memmortigis en la melankolia stato enpuzante traŭĉilon en la koron.

El Germanujo.

Eksplodo de la benzino Frankfurto apud Maino. (tol. propr.) En unu et tieaj fabrikejoj okazis eksplodo de la benzino. Librotenisto Götze mortigita, du laboristoj grave vunditaj, multe facile. En la fabriko la eksplodo faris grandajn difektojn. Okazis fajrego, kiu alprenis grandajn dimensiojn.

El Italujo.

Konferencoj pri paco. Romo. (Tel. propr.) Ĝis ĉesigitaj konferencoj kun Turkujo, estas de nove komencitaj en Svisujo, ĉar nova registraro turka konfirmis deputatojn.

Eksplodo de vulkano Stromboli. Romo (tel. propr.) Oni sciigas nin el Messina, ke vulkano Stromboli estas tre aktiva. El kratero eliĝas densa fumo kaj grandaj masoj de l' lafo. Oni aŭdas subteran bruegon.

El Turkujo.

La esperoj de Junturkoj. Berlino (Propra tel.) El Konstantinopolo oni sciigas: La Junturkoj esperas la venkon. La pli granda parto staras je la flanko de Junturkoj.

Tertremego. Konstantinopolo. (Tel. propra). Je horo 3:20 oni eksentis tie ĉi fortan tertremegon. La loĝantaro elkuris el siaj domoj pro granda paniko. Ĝis nun ne estas konata, ĉu la tremego kaŭzis ian domaĝon. La centro de l'tremego estis verŝajne ie en la ĉirkaujaĵo.

Vieno. (Tel. propr.) El Saloniko, Konstantinopolo kaj Sofio oni sciigas pri tertremego, kiu ripetigis en la balkana duoninsulo.

El Balkano.

Subita forveturo de l' Bulgara reĝo. Budapeŝt. (Tel. propr.) Grandan senzacian elvokas la subita forveturo de l' bulgara reĝo Ferdinando el la Hungarujo al Sofia. La reĝo Ferdinando restadis en Hungarujo kune kun sia familio en ia sana urbo. Li intencis resti tie tutan monaton.

Tamen li forveturis hieraŭ subite tra Budapeŝt al Sofia. Tiun ĉi surprizan forveturon oni ligas kun danĝera situacio en Balkana duoninsulo. Oni supozas, ke la Bulgaraĵo troviĝas antaŭ gravaj okazantaĵoj.

Kiel estas sciite oni rakontis en lastaj tagoj tre multe pri la sinarmado de Bul-

garujo kontraŭ la Turkujo kaj pri ebla batalo bulgara-turka.

Montenegro kaj Turkujo. Cetinio (Tel. pr.) Turka delegito elveturis de tie-ĉi, tamen la diplomaj rilatoj kun Turkujo ne estas rompitaĵ. Intuis al tio angla kaj rusa registaro.

En la loko Tornu, sur la fervoja linio al Adrianopolo okazis dum tertremo brulo pro renversigo de lampo. Forbrulis 300 domoj. En Gallipoli disfalis sekve de tertremo telegrafa oficejo kaj kelke da domoj.

El Rusujo.

Poincaré en Rusujo. Kronŝtad (propr. tel.) Alvenis tien-ĉi franca ministro-prezidanto Poincaré sur la ferdeko de la kruzisto; salutis lin la ministro de la marservo, ambasadoro franca kaj aliaj. Poincaré alvenos hodiaŭ vespere al Petersburgo.

Sunvarmejoj. Petersburgo. (Tel. propr.) Tie-ĉi kaj en Moskvo regas sunvarmejoj. En diversaj gubernioj varmejo atingas 35° C. Forbruligis multe da arbaroj.

Holero. Witebsk (tel. propr.) Oni tie-ĉi konstatis 5 okazojn de malsaniĝo je la holero.

El Usono.

Korupto. Detroit. (tel. propr.) Oni nin sciigas el Nova Yorko: En Detroit oni malliberigis 15 membrojn de Urba Konsilantaro akuzante ilin, ke ili prenis koruptmonojn por la venditaj propaĵoj de Urba fervoja societo.

Anoncoj.

JAM APERIS UNUTAGAĴO

„Politika Malliberulo“

Priskribanta la vivkondiĉojn de politikaj malliberuloj en Rusujo.

Aĉetebla en librejo FR. EBERT
Krakovo str. Floryańska 35.

PREZO

KR. 0-60. SM. 0-25.

I. kaj r. patento Nr. 41589.

Mirinda eltrovo por suferantaj je la hernio
Nov-eltrovita saniga

Hernia zoneto

apud kiu konsistante el du partoj peloto ne surpremas hernian malfermaĵon, sekve ne elpremas inteston internen, kio povus kaŭzi diversajn intestajn suferojn, kiel okazadis ĉe la ĝisnunaj zonetoj. Ĝi kaŭzas bonan situacion de l'intestoj en la ventra kavoj. Eĉ por la plej ekstrema sufero ĝi estas tre facilpeza, sen risorto aŭ metalo ĝi estas portata sen doloro kaj ĝi subtenas radikale. Oni sendas klarigon post ricevo de poŝtmarko; elsendo senprokrasta.

M. I. Kantorowicz,

Podgórze strato de Józefińska 6.

Filioj: Varsovioj, Sosnowice, Vieno.

ĈEFTENEJO DE VESTAĴOJ

MAISON DE PARIS

G. SPRUNG

Kraków,

Grodzka 30.



KONGRESA BULTENO

aldono al »ILUSTROWANY KURYER CODZIENNY« al n. 183.

Redakcio, Administracio kaj Ekspedicio
Kraków, str. Karmelicka, l. 16.
Telefono 1198.
Ĉefredaktoro kaj eldonisto *Maryan Dąbrowski*.

Prezo de Nro:
10 heleroj.

La „Kongresa Bulteno“ eliras ĉiutage dum
la kongresaj tagoj je la 6a horo vespere.

La redaktanta Komitato:
L. Kronenberg, E. Pfeffer, A. Czubyński

Nr. 2.

KRAKOVO, MARDE LA 13. DE AUGUSTO 1912.

Nr. 2.

Parolado de prof.

Odo Bujwid

dum la hieraŭa matenmanĝo, eldonita de la Krakova Urbeŝtaro por la honorigo de nia Majstro:

Ni vidas inter ni homon de granda merito por la homaro, homon tiel modestan, ke mi timas per mia parolo ekvundi liajn delikatajn sentojn. Mian taskon plifaciligas mia persona interrilato al Zamenhof, kun kiu mi pasigis miajn studojn en la Varsovia universitato. Ĝiam silenta kaj modesta, ĉiam pensema — Li, de la plej frua juneco tordonis sin al la penso pri la lingvo internacia. Ni, Liaj kolegoj estimis Liaŭ fervoron, sed ni ne povis ekkompreni lin ĝuste.

La ideo mem estis tiam sufiĉe diskreditita pro la komplete malsukcesinta provo de Volapük. Sed Zamenhof ne lasis sin fortimigi de la malsukcesoj nek eĉ de la mokado. Li iris rekte la vojon celitan. Li karesis sian penson, kvankam Li devis serĉi por ĝi la rimedojn en malfacila laborenspeza vivado, portanta al malriĉa loĝantaro de Varsovio kuracistan helpon.

Antaŭ ne longe, antaŭ du jaroj, ni, komunaj kolegoj, festis, kunveninte en Varsovio, la dudekkvinan jubileon de nia laboro sur la kampo de la medicino. Alie ni rigardis nun la ideon de kolego Zamenhof, la ideon, kiu el la regiono de revoj transiris en la realecon.

Ni salutas hodiaŭ la grandiozan ideon, kiu komencas ĉirkaŭpreni la tutan mondon kaj ni deziras al ĝi tian disvolvigon, kian ĝi sendube meritas. Samtempe ni deziras al Zam., ke tiu ĉi ideo ekregu sendivide la mondon, por fratigi la homojn kaj por pretigi pli bonan estontecon al la tuta homaro.

**Vivu Zamenhof!
Vivu Zamenhof!
Vivu Zamenhof!**

Antaŭ 25 jaroj.

Nia malnova samideano kaj esperanta poeto S-o Leo Belmont antaŭ 25 jaroj, tuj kiam li eklernis Esperanton, ravite skribis al nia Majstro ĉi suban leteron, en kiu li profetis la venkon de Esperanto.

Estimegita Sinjoro:

Mi devas ekdiri mian penson, mi ne povas malliberigi mian skribilon, mi bezonas nun, en plej proksimaj vortoj, ekvoĉi al vi: „Vi venkos, sinjoro, vi venkos!“ Kvankam blinda mondo ridetas kaj ridegas, per fingroj montras la „lingvofaristojn, la

gramatikajn ekvilibristojn la leĝdonantojn de tutmonda parolegajo“, kvankam Volapükanoj, kaj Esperantoj hodiaŭ ne unufoje ruĝiĝas je vangoj en praktika societo, kaŝas en anguloj de l'animo sian „sonĝaron“ aŭ eĉ faras sin „ridindaj“; kvankam iaj kritikuloj, genuiĝantaj nur antaŭ propra saĝeco aŭ antaŭ estinto, ne komprenantaj la estonton, ŝanceligas la „saĝaj kapoj“, — kvankam, fine, multaj homoj ekbaros vian iradon kontraŭ Volapük, malgraŭ mil aliaj kaŭzoj kaj baroj, vi venkos, Sinjoro, vi venkos!

Mi nun, kun ĉiu tago, pli kredas, ke post mallonga tempo via lingvo eksomos en milaj buŝoj de l'unua fino ĝis dua fino de Eŭropo. Tiel facila ĝi estas, ke la plej granda parto de homoj ne komprenos vian laboron; jam hodiaŭ mi aŭdis: oni diris ke vi donis nenion, ke vi nur ŝanĝetis la vortojn de lingvoj romanaj... kaj sciis, Sinjoro — ha, vi mem tion scias, ke ĝi estas la plej, granda laŭdo por vi, la homaro tion poste komprenos!

Kaj mi, mi estos feliĉa, ke jam hodiaŭ mi konas vian lingvon. Kiom da plezuro havas mi per ĝi! Mi pli kaj pli miras, ke per via vortareto oni povas eldiri tielan riĉecon da pensoj kaj pensunuoj.

Mi ne kredis ankoraŭ hieraŭ, ke mi trovos tion kion mi havas hodiaŭ. Ĝi ne estos superlaŭdo, se mi diros, ke en via lingvo oni povas ekkrei per facilaj rimedoj fortajn kaj malfortajn (egecon kaj etecon), kuraĝecon kaj ironion, fajrejojn kaj ombrejojn de pensoj, de sentoj, pli videble, pli kompreneble, pli senteble ol en la lingvoj naturaj; stilo tie ĉi estos kun tempo pli originala, pli nova, pli lakonika kaj pensoplena, brila, harmonia kaj sprita!

Mi ne povus al vi tion diri antaŭ okuloj; sed vi povas kredi al mi per via tuta koro. Kion mi skibas, mi skribas kun kredo kaj espero, kaj mi ne povas alie skribi, kiam mi vidas, ke mia plumo flugas, kuras kaj fluas sur papero kaj ankaŭ bone aŭdas miajn pensojn kaj ne trompas min!

Kaj ĉu mi tre ŝvitis aŭ tre enuis, ekler-nante vian lingvon?... Ne!.. neniom!..

Ho! se la instruistoj de l'amaso, la geniaj homoj, la poetoj konus vian lingvon!! Mi, kiu hodiaŭ iom konas kelkajn aliajn lingvojn, mi jam havas multe pli larĝan horizonton!

La kreinto de bona lingvo internacia estas preskaŭ dua Gutenbergo: tiu ĉi donis flugilojn al homa penso, tiu detruas la lingvajn murojn, kiuj baradis la pensojn de la diversaj popoloj!

Kaj vi estas tia kreinto! Kvankam mi estas nek antaŭvidanto, nek estontparolisto, (profeto) mi maltimas tion ekvoki:

Vi venkos, Sinjoro, vi venkos!



Supre ni reproducias portreton de ĝenerala sekretario de la Organiza Komitato Dro Leono Rosenstock, vere ĝenerala ĉeforganizanto de Kongreso. Dro L. Rosenstock de unu jaro varmege klopodas pri la plena sukceso de la Oka Kongreso. Tion konfirmis en siaj paroladoj dum Inaŭguracia Kunsido de la Kongreso — prof. Carlo Bourlet kaj la sekretario de la Centra Oficejo S-ro G. Chavet, kaj ankaŭ la ovacio, farita post Kunsido de ĉeestantoj en Malnova Teatro pravas, ke Li plene meritas tian estimon kaj dankemecon por siaj laboro kaj klopodoj.

Programo
de teatra vespero 13 de aŭgusto 1912,
en Arhitektura Ekspozicio.

Unua parto:

1) Prologo — (kiu povas esti aŭ ne esti, tiel nomita). S-ro Stradiot F. (Polo).

2) Ĥorkanto:

a) „Lulkanto“ de J. Gall (esperante) la krakova kantlernantaro de prof. S. Bursa;
b) „Mazurek“ de S. Bursa (pole) la krakova kantlernantaro de prof. S. Bursa.

3) Skotaj Humoraĵoj, S-ro John Maben Warden (Skoto).

4) Hungaraj Kantoj (kun akompano de cimbaloj), S-ino Etelka de Shater, Hungarino.

5) „URSO“, komedio en unu akto de Ĝehov, tradukita el la rusa lingvo de S-ro Devjatnin.

Personoj: Popova, S-ino Schaefer (Germanino); Smirnov, S-ro Devjatkin (Ruso); Luka, S-ro Rifaat Romano (Turko).

Paŭzo 10 minutojn.

Dua parto.

6) Hungaraj kantoj kun akompano de cimbaloj:

a) „La nokto de nigrokuloj brilas kiel ĉielsteloj“, S-ino Etelka de Shator (Hungarino);

b) „Je tio petas min la patrino: amu mi nur unu amatinon“, S-ro Etelka de Shator (Hungarino).

7) Polaj Humorajoj:

a) „Fatala tago“, S-ro Stradiot Feliks (Polo);

b) „Logiko de niaj virinoj“ S-ro Stradiot Feliks (Polo);

c) „En frenezulejo“, S-ro Stradiot Feliks (Polo);

8) Horkanto:

a) „Heroa kanto“ de St. Moniuszko, la krakova kantlernantaro de S-ro Prof. St. Bursa (Poloj);

b) „Krakoviako“ de J. Gall, la krakova kantlernantaro de S-ro Prof. St. Bursa (Poloj).

Komenco de Spektaklo je 9 vespere.

„Kongresa Bulteno“.

Dum la unua reprezentado en Teatro de Novajoj oni kolportis en la ĉambro unuan numeron de „Kongresa Bulteno“ oficiala organo de la Oka, kiu aperados kiel la eksterordinara aldono al „Ilustrita Kuriero Ĝintaga“. La disvendado vige progresis kaj en unu momento poste estis nek unu partopreninto de la kongreso, kiu ne estus provizita per la gazeto.

La redaktado de bulteno renkontiĝas kun multe da baroj: komence mankis niaj esperantaj redaktantoj, la kompostistoj ne konantaj la lingvon ne povas tiel rapide komposti la gazeton kiel en naciaj lingvoj, kaj tial la plibonigado de elpresa teksto postulas pli multe da tempo. Cetero mankas la homoj kiuj volus kunlabori, kaj la ĝisnunaj 4 laborantoj estis devigataj samtempe verki, traduki, plibonigi la tekston.

Ni petas samideanojn, en Via propra afero: Helpu al ni, alsendante la artikolojn pri viaj impresoj el Krakovo kaj viaj eventualaj postuloj kaj deziroj.

Unua tago de Universala Kongreso Esperantista.

Antaŭ malfermo de la kongreso.

La tago antaŭiranta malfermon de la kongreso, havis jam karakteron de festa tago. Jam du trionoj de la partoprenantoj de la kongreso troviĝis de la mateno en Krakovo, vizitante la stratojn de la urbo kaj interese rigardante la konstruaĵojn. Plejvolonte tamen ili sidis en la domo ĉe Komercia Akademio, transdonita al la uzo de la Kongreso. Tie troviĝis ĉiuj kongresaj oficaj butikoj, banko (provizora filio de Krakova Landa Banko) bufedo, la skribĉambro kaj la ĵurnalista ĉambro — fine sur III. etaĝo: Esperanta Ekspozicio tre riĉe provizita kaj efektive tre interesa.

Malgraŭ ĉirkaŭ milo da personoj vizitintoj ĉiutage la ĉambroj kaj koridoroj de Akademia konstruaĵo, ĉie regis perfekta ordo, konservata antaŭ ĉio per la kongresantoj mem.

Sur la stratoj de la urbo.

Urbo vestiĝis festene por la kongreso. El urbaj konstruaĵoj flirtis standardoj en la urbaj kaj naciaj koloroj. Ankaŭ multe da domoj elpendigis standardojn el la frontonoj, plejmulte kiel ĝenerale en Florianaj strato. Estis malmulte da esperantaj standardoj, ĉar nur sur hotelaj konstruaĵoj, tamen multe de malgrandaj samkoloraj signifantaj firmon rekomenditan per la kongresa komitato, kie oni parolas esperante. Ankaŭ kelkaj hoteloj kaj privataj konstruaĵoj en logejoj distingiĝas per la samaj signoj.

Harmonie plikompletigas tutaĵon afiŝoj en Esperanto. Aperis tiel multe da ili, ke ili formis 80% da ĉiuj urbaj afiŝoj.

Prezentado en teatro de Novajoj.

Sabate vespere preskaŭ ĉiuj gastoj troviĝis en la konstruaĵo de „Teatro de Nowości“, kies kabaretan parton oni prezentis esperante. Larĝa ĉambro teatra pleniĝis ĝis la lasta sidejo, kaj la agordo estis efektive solena. En unu de logejoj prenis lokon la kreinto de la lingvo kun la edzino.

Post finita unuakta prezentado, teatra horo kantis „Esperantan Himnon“. Oni aŭskultis la kanton solene.

Kabaretan flankon pleniĝis artistoj de la Teatro de Novajoj: Palčevska, Sydor kaj Karbowski kantante kaj deklamante. Kun granda plezuro oni aŭskultis la kantadon de almozulo „Kial en Krakovo okazadas la VIII Kongreso“, traktanta pri krakova delegito, kiu ne estas tiel fraŭlinama kiel oni lin prezentis, sed tre zorgema kunorganizatoro de Oka, al kiu la kongreso multe ŝuldas. Tre interesa estis ankaŭ la parolado pri „Centra Kuirejo“ de Juliusz Kriss („Hino“), kiu bone posedas la lingvon kaj ŝerce priparolis la tendoncojn en nuna Esperantistaro.

Alveno de novaj kongresanoj.

Dum la reprezentado en malnova teatro alvenis al Krakovo la lasta parto de Krakovaj gastoj kalkulanta kelkcenton da samideanoj.

Alvenintaj gastoj, tuj dislokiĝis en la logejoj.

Granda ordo regis en la stacidomo kaj antaŭ la Komercia Akademio. Policanoj esperantigitaj kaj la komisaroj informis fremdajn samideanojn.

Dimanĉe antaŭtagmeze.

Sekvantan tagon jam matene komenciĝis la kunsidoj de apartaj sekcioj en la ĉambroj de Komercia Akademio. Tie debatis precipe germanaj esperantistoj, kiuj multnobre partoprenas en Krakova kongreso.

Samtempe oni fotografiis kelkfoje en la Komercia Akademio naciojn kaj apartajn personojn.

Tiu ĉi antaŭtagmeza kongreso mem, kiu oficiale komenciĝis je 3 posttagmeze.

Matenmanĝo aranĝita de la Urbestro.

Jus antaŭ la inaŭguracio je 1 h. okazis matinmanĝo en restoracio de Malnova Teatro por honoro de la delegitoj de nacioj reprezentitaj en la kongreso. Kun la reprezentantoj de la Urbkonsilantaro aŭtonomaj institucioj kaj Krakova preso, kunvenis apud la tablo pli multe ol cent personoj. Unua parolis la vicprezidanto Szarski (pole kaj samtempe pedeloj disdonis esperantan tekston de la parolado, salutante la kunvenon en la nomo de la urbo, kion sekvis paroladoj de dro Zamenhof kaj de la delegitoj de apartaj nacioj.

Babilinte ĝis 3a horo oni fotografiis sin sur la ŝtuparo de Arta Palaco.

Ovacio por Dro Zamenhof.

Post la matinmanĝo okazis inaŭguracio de la kongreso, dum kiu parolis en nomo de krakova Organiza Komitato prof. Bujvid salutante Internacian Kongreson inter muroj de nia urbo.

Poste la prezidanto donis voĉon al la kreinto de Esperanto Dro L. L. Zamenhof. Kiam la Majstro leviĝis de sia seĝo ĉeestantoj ankaŭ imitis Lian ekzemplon kaj trifoje vivuante, longe kaj brue aplaudis la Majstron, por kies honoro oni fine ekkantis himnon „La espero“. Tiam la Majstro komencis paroli kun granda libereco kaj Lian paroladon la ĉeestantoj aplaudis kelkfoje. Kiam la Majstro sciigis, ke la krakova Kongreso estas la lasta, dum kiu Li aperas antaŭ Kongresanoj, ekbruis unuvoĉe la protesta vorto: „ne, neeble“.

Sekvis la paroladoj de oficialaj reprezentantoj registraraj, inter kiuj plej gran-

dan impreson faris la parolado de i. k. r. Subkolonelo L. Gostomski, oficiala reprezentanta de aŭstria ministerejoj por milito kaj landa defendo.

23 nacioj.

Sekvis dekelkaj paroladoj el diversaj nacioj, inter kiuj diferencigis plej bele la rumana delegitoj, el kiuj unu blinda donacis al nia Majstro portreton kun pramana subskribo de la reĝino rumana Elizabeto, konata poetino sub la pseŭdonimo Carmen Sylva. Inter paroladoj de la reprezentantoj distingigis ankaŭ kapitano de aŭstria artilerio, kaj kimra sanndeano Jack Edwardo el Aberystwyth, kiu antaŭ ĉio klarigis kie loĝas kimra nacio, lasta restaĵo el tre riĉa loĝantaro latinigita de Cezar kaj de la romana invado, ankaŭ la parolado de baska samideano, bedaŭrinde tre mallonga, kvankam ni volante aŭdus pli multe pri tiu nacio, kies parenceco kun aliaj estas tiel malklara.

Paroladoj kaj personoj de la Japano, Meksikano kaj Hindu vekis grandan sensation, simile kiel de majoro de la regimento hungara el kroata tamen nacio, kaj de Finlandano, Serbo, Bulgaro, Dano, Svedo, Norvego, Ruso (reprezentanto de la ministerio de publika instruado), Ukrainano, Italoj, Angloj, Irlandano, Skoto, Belgo, Kataluno kaj de pola reprezentanto Grabowski el Varsovio.

Fino de la inaŭguracio.

Fine oni tralegis tutan ordon de la telegramoj kaj gratulaj leteroj de la esperantaj societoj kaj eminentaj esperantistoj. Oni akceptis ilin kun aplaŭdoj, kiuj transiris en muĝan esprimon de neeldirebla ĝojado post la tralego de la depeŝo de ĥinaj esperantistoj el Ŝanghaj.

Poste oni decidis sendi telegramon al aŭstria imperiestro kaj rumana imperiestro laŭ propono de Leo Belmont, advokato kaj redaktoro el Varsovio.

Raŭto en Pafilejo.

Du horojn poste kunvenis denove preskaŭ en kompleto 1000 personoj, por komuna vespermanĝo kaj la raŭto. Vesperon oni pasigis tre agrable, konatigante reciproke kaj babilante. Orkestro de 100 regimento de la infanterio ludis ĝis la meznokto, ankaŭ nian himnon. Oni faris al nia Majstro ovacion ĉirkaŭportante lin sur la brakoj.

La raŭto daŭris ĝis la 1 h. post la noktomezo.

Kunsidoj lundaj.

Hodiaŭ je 8^{1/2} horo matene kunvenis preskaŭ ĉiuj kongresanoj sub monumento de Mickiewicz (Cefplaco - Rynek) kie okazis unua komuna fotografado! De tie ĉiuj ekiris marŝe kaj venis sub kastelon sur Wawel-monto, kie sekvis dua komuna fotografado.

Poste ĉiuj revenis ĉambregon de „Malnova Teatro“, kie antaŭ 10-a horo S-ro B. Mudie malfermis kunsidon de U. E. A.

Nelonge poste, ĉar post 11-a horo komenciĝis debatojn en ĉambroj de Komercia Akademio III diversaj fakaj sekcioj. Okazis la kunsidoj de liberpensuloj, katolikoj, ĵurnalistoj esperantistaj, psikistoj kaj teozofoj, farmanciistoj, kaj fine de ruĝkru-canoj.

Hodiaŭ okazis ankaŭ kunsido de la anoj de „Germana Esperanto Asocio“.

Posttagmeze je 2^{1/2} horo okazis kunsido de kuracistoj (en salono de „Kuracista Societo“ ĉe str. Radziwiłłowska), de instruistoj, juristoj, bankoficistoj, poŝtoficistoj, komercistoj.

La kunsidon de liberpensuloj prezidis prof. Dro Stromboli el Genova. Oni decidis, ke sekvanta kunsido okazu vendrede 16-an, dum kiu oni elektos esperantistajn Delegitojn por Internacia Kongreso de liberpensuloj en München (Germanujo).

Jus, kiam ni donas tiu ĉi artikolon por presado, komencis siajn laborojn Rajtigitaĵoj Delegitoj en Malnova Teatro.

Je 6-a horo vespere okazos en Salono de Kuracista Societo (str. Radziwiłłowska 4) du prelegoj unu de Dro Andreo Fišer el Tiflis „Pri duonforĝita anguleto de Kaukazo“ la dua de Dro Geliebter el Vieno „Pri timiga iluzio kaj realeco“.

Je 10-a horo vespere tuj post finiĝo de la Jubilea Festvespero okazos en sukeraĵejo de J. Michalik (str. Floryńska 45) vespermanĝa kunveno de studentoj-esperantistoj.

RICEVITAJ ELDONAJHOJ.

La Redakcio recenzas nur la verkojn, alsenditajn al ĝi en du ekzempleroj.

Odo Bujwid, profesoro de Jagellona Universitato en Krakovo: Kvin prelegoj pri bakterioj. Skizo pri ĝeneralaj principoj de bakteriologio en apliko al infektaj malsanoj. Kun aldono de rimarkoj kuraĝaj, inokuloj profilaktitaj kaj desinfektado. Krakovo, Gebethner kaj Kio; prezo 50 Sd. = 1 K. 20 h.

Kun disvastigado de nia lingvo, disvastigas ankaŭ ĉiam pli kaj pli esperanta scienca literaturo.

Precipe ne mankas jam verkoj medicinaj en Esperanto. Longan vicon de la antaŭe aperintaj pliriĝigas ĵus aperinta broŝuro de fama pola bakteriologo Bujwid, samtempe fervora esperantisto. Pro manko de speciala scienco en la medicina direkto ni ne povas recenzi la verkon; ni nur konstatas, ke ĝi estas zorge eldonita kaj ke la esperanta traduko de So. Emil Pfeffer estas modela kiel ĉiam. La valoron de la libro altigas multe la aldonita tabelo de mikrofotografiaj surpreroj.

Ilustrita Gvidlibro tra Budapeŝto de Géza Nyulászy de Csáholly aperis antaŭ nelonga tempo en 10.000 da ekzempleroj. Eldonaĵo zorge prilaborita kaj ĝenerale tre rekomendinda al la esperantista publiko.

Ruĝa standardo, la internacia himno de socialistaj esperantistoj. Jubilea eldono, Kraków 1912. Esperantigis S. K. Aĉetebla en Krakovaj librejoj. Prezo ne montrita.

La traduko estas vere majstra.

La novaj fervojoj tra aŭstriaĵoj Alpoj. Eldono de aŭstriaĵoj ŝtat fervojoj. La libreto estas ornamita per riĉaj fotografajoj.

„La Marto“ Kongresa jubilea numero.

Ĝiam agema So. Taubmann, redaktoro de „La Marto“ faris al siaj abonantoj tre agrablan surprizon. Okaze de la jubilea kongreso li eldonis specialan numeron, kiu devas troviĝi en la manoj de ĉiuj kongresanoj. En la jubilea numero trovas sin bonega artikolo pri Krakovo, verkita de Sino Laura Schleichkorn.

Instituto de l' Higieno de Jagellona Universitato en Krakovo eldonis la broŝuron de Bujwid, titolitan: „La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de l'akvo.“

Kunveno de esperantistaj liberpensuloj okazis hodiaŭ. Je la nomo de polaj liberpensuloj malfermis ĝin So. Kronenberg. Prezidanto estas elektita So. Stromboli el Italujo. Oni diskutis pri la aranĝota propaganda kunveno poresperanta inter Krakovaj neesperantistaj liberpensuloj. Plej proksima kunveno merkrede. Ĉiuj liberpensuloj estas petataj alveni.

68.847 aŭskultantoj, 180.026 volumoj forpruntitaj el Biblioteko, 141.313 vizitantoj la Legejon, karakterizas la ĝisnunan agadon de la „Popola Universitato“ en Krakovo. La iniciato kaj laboro de Popola Universitato donis la daŭrajn fundamentojn al Publika Biblioteko enhavanta pli ol 10.000 verkojn precipe de scienca enhavo kaj kreis solan Publikan Legejon en Krakovo, posedantan pli ol cent gazetojn. Eminentaj scienculoj partoprenis en multaj prelegoj, kiuj konigis al aŭskultantoj, devenantaj el ĉiuj sociaj klasoj, la nacian kulturon kaj la akirojn de civilizacio (homaro), kaj klarigadis la plej gravajn demandojn sciencajn kaj de ĉiutaga vivo. Prelegoj en Popola Universitato pliriĝigis scienca literaturon per multaj belaj kaj facilaj libroj (inter kiuj troviĝas tiel entuziasme akceptitaj de kritiko eldonaĵoj de „Naturscienca Biblioteko“). Metodaj laborakiroj de la Popola Universitato kausis la seriozajn diskutadojn koncerne la aferojn de la popularigo; resumos ilin aperonta speciala libro.

Ge Popola Universitato ekzistas oficejo pe scienca konsilo, donanta al la menlernantoj indikojn; socia arĥivo kolektanta dokumentojn de socia vivo; kultura arĥivo, donanta al la laborantoj por popola klerigo riĉan materialon. — Popola Universitato aranĝas konstante ekskursojn al muzeoj, ekspozicioj, antikvaj restaĵoj, fabrikoj, — natursciencajn ekskursojn k. t. p.

Popola Universitato estas la sola institucio, en kiu de multaj jaroj okazas ĉiujare prelegoj pri internacia lingvo, kiuj propagandas esperanton.

Popola Universitato estas ĉe ni la sola institucio kleriga, kiu (malpli diversflanka ol aliaj societoj, malpli videbla en politika vivo) sisteme kaj laŭplane laboras de multaj jaroj sur sama posteno por efektiviĝi kaj pliprofundigi la aserton „scienco por ĉiuj“.

La Popola Universitato, fondita pro centa naskiĝjaro de nia granda poeto, profesoro de universitato en Lozano kaj Genevo, kies revo kaj idealo estis: ke liaj libroj troviĝu sub ĉiu pajla tegmento, arigas la tutan sacion kaj antaŭ ĉio tiujn „malgrandulojn“, al kiuj la regno ne donas la postulitan kulturon kaj al kiuj la tre malfacilaj vivkondiĉoj ne permesis lerni. Precipe fruktodona estas la laboro inter laboristoj, kiuj kun entuziasmo aŭskultas prelegojn kaj preterlasas nenian okazon por ekkoni de niaj prelegantoj kaj el nial libroj la belecon de l'mondo kaj akirojn de kulturo kaj scienco.

Popola Universitato atingas ankaŭ vilaĝojn. Eĉ en tre malgrandaj vilaĝoj malproksime de fervojo oni renkontas prelegantojn de P. U., kiuj ĉie entuziasme portas, laŭ vortoj de pola poeto, lampejon de la kulturo.

La laboro de P. U. estas batalo kun ĉiuj elementoj, kiuj volonte vidus malklerecon, por kiuj malklereco de la popolo estas sojlo, per kies helpo oni atingas havaĵon kaj gloron. La malfacila kaj penega laboro kleriga donos kun tempo belegajn fruktojn.

La Popola Universitato posedas en ĉiuj partoj de Galicio filion kaj nia kuna laboro disvastigas ĉiam pli kaj pli.

La kuranta kongreso esperantista sur Pola tero trovas nin ankoraŭ pliriĝigitajn.

Ni proponas dum venontaj kongresoj esperantistaj la kreon de fako de klerigaj arigoj.

Centra Komitato
de Popola Universitato — Krakov.

LOKA KRONIKO.

La kongresanoj, kiuj antaŭpagis loĝejon ricevos sian monon en la akceptejo. La

loko estos publikigita afiŝe.

Propono pri la kunveno de esperantistaj ĵurnalistoj. Je la nomo de la Redakcia Komitato de „Kongresa Bulteno“ mi proponas, ke la kunveno de esperantistaj ĵurnalistoj okazu marde je 8-a horo vespere. Ĉiuj partoprenantoj bonvolu sciigi min pri tio.

L. Kronenberg.

Ni estas petataj de S-o Levy, nia rumana samideano, ke li akceptas dum la kongreso antaŭpagon por tiea esperanta gazeto „Danubo“. Koncerne S-on Levy ni rememorigas la kongresanojn, ke lia parolado dum la malferma kunsido de la Okafaris grandegan impreson sur ĉiuj ĉeestantoj, pro tio, ke la paroladinto estas naskita blindulo. La ekabonon de „Danubo“ ni varmege rekomendas al ĉiuj samideanoj, des pli, ke la esperantista movado en Rumunujo estas precipe subteninda.

La reĝa dragona regimento N-ro 10, havas la honoron inviti ĉiujn kongresanojn por senpaga vizito de la ĉevalvetkurado ĵaŭde 15-an posttagmeze je 3-a sur la Krakova ĉevalkurejo.

Ilia Kongreso de U. E. A. Labora Kunsido de U. E. A. okazos merkredon matene je la 9a horo en la Kongresejo de U. E. A. ĉe la Komerca Akademio. Ĉiuj Esperantianoj estas invitatataj aĉeti la Kongreskarton ĉe la Oficejo de U. E. A. en la Komerca Akademio.

Ekskurso al Zakopane kaj Tatry okazos tuj post la fermo de la Kongreso dimaĉe 18-an je la 6a horo matene. Kunveno en la stacidomo. En la programo estas vizitado de muzeoj, de fama „Morskje Oko“ (Mara Okulo), vizitado de ĉirkaŭajaj montoj. La tritaga ekskurso kostos 25 Sm, enkalkulante manĝaĵojn, hotelon, fjakrojn k. t. p.; kiu volas aliĝi, anone sin tuj en la Akceptejo ĉe la speciala tablo.

Ekskurso al Praha. Ĉiu veturanto al Praha post la Kongreso bonvolu sciigi sian adreson al delegito de U. E. A. Vojtech Kraus (Praĥano), kiu donos al ĉiu bezonajn informojn. Nuna adreso: Kraus, Esperanto, Krakovo, Hotelo Narodovy.

Krakovajn vidajokartojn. esperantistajn, kongresajn poŝtkartojn jubileajn kaj ankaŭ kongresajn markojn propagandajn oni povas aĉeti ĉe apartaj tabloj en koridoro de unua etaĝo. Ĉiu kongresano nepre sendu al siaj konatuloj kongresajn kartojn kun speciala kongresa poŝtstampilo, (tre malofta okazo por filatelistoj). Helpu la kongresan kason.

Leterojn kaj poŝtkartojn oni devas ĵeti en poŝtan keston, kiu troviĝas ĉe ŝtuparo de teretaĝo (inter la Bankoficejo kaj Bufedo).

Teozofia kunveno organizata de T. E. L. (Teozofia Esperanta Ligo) okazos la venontan vendredon je la naŭa matene kun sekvanta laborprogramo.

1) Parolado pri la teozofia doktrino parolos S-ino Diou-Trouillon.

2) Sinjorino Liard legos eltiraĵon el la verkoj traktantoj pri la teozofio.

3) Raporto pri la farita laboro (La historio de l'organizaĵo).

4) Laborprogramo por la estonteco.

5) Proponoj kaj ĝenerala diskuto.

Ĝiuj Esperantistoj interesigantaj pri la gravaj problemoj, kiujn pritraktas la teozofio: estas petataj veni akurate por helpi al la disvolvo de T. E. L.

Internacia Studenta Kongreso okazos marde 13/8. en speciala ĉambro de Komerca Akademio III. Kongreson aranĝas Ĝiostudenta Asocio, reprezentota per ĝeneralsekretario sro. Mareš. Programo: 1) Malfermo de la kongreso (kol. Mareš). 2) Elekto de la prezidantaro de la kongreso. 3) Legado de salutleteroj kaj salutoj de la delegitoj. 4) Paroladoj: a) Praktikaj bezonoj de la esperantista studentaro (kol. J. Mendrkiewiĉ), b) Organiza

Kio estas la „Popola Universitato de Adam Mickiewicz en Krakovo?“

Antaŭ ĉio ciferoj:

1883 prelegoj, kiuj kolektis 275.487 aŭskultantoj, 1457 prelegoj kvartalaj kun

demando (kol. E. Loth), c) Pri studenta organizaĵo (kol. K. Haltmar, d) Centra organizaĵo de la studentoj (kol. R. Hromada), e) Pri „Universala Studenta Asocio“ (kol. J. Meres). 5) Specialaj proponoj pri unu sola, centra internacia organizaĵo de la esperantista studentaro. 6) Voĉdonado. Definitiva decido pri la studenta centro. Efekto de la prepara komitato. 7) Fermo de la kongreso au resp. seiĝo de la dua kunveno.

Gekolegoj, kiuj volas ankoraŭ paroladi komuniki tion antaŭe al kol. Meres.

Grava avizo! Kongresanoj antaŭpagintaj loĝejojn bonvolu veni en la akceptejon merkrede la 14 an de aŭgusto inter la 9-a kaj 12-a horo antaŭtagmeze, kie la kasisto repagos al ili la monon!

Kongresa poŝtoficejo. Ni sciigas ĉiujn kongresanejn, ke la leterojn eksterlandajn kaj ekster krakovajn ili povas ricevi nur en kongresa poŝtoficejo, kiu troviĝas 120 paŝojn proksime de la kongresejo nome ĉe la strato Podwale nro 3.

Antaŭ la pordego de la poŝtoficejo sur la lanterno pendas surskribo: Kongresa poŝtoficejo.

La interkongresanajn leterojn oni devas jetadi en la leterkeston, kiu troviĝas en Akceptejo (konvena surskribo!) ankaŭ tie ĉe unua oficisto kongresa ili estas riceveblaj.

Kulturhistoria (epoko 1813/1815) kaj ĝardenkultura ekspozicioj. Breslaŭ majo ĝis oktobro 1913, aranĝataj de l' Gef- kaj Rezidencurbo Breslaŭ (Silezio — Germanujo).

Krakova gazetaro. Lastaj sciigoj, Estas surprizita kaj mirigita per la hieraŭa malferma kunsido de la Kongreso. Oni ĉion laudas, ĉion kortuŝite priskribas. Verŝajne nia Espero eĉmarŝis venke Krakovon kaj Polujon.

Programo de la Fakaj Kunsidoj de T. E. K. A.

A) Administra kaj organiza parto.

I. — Malfermo de la kunsidoj kaj raportoj de la Sekretario D-ro E. Rothsuh (Aachen) kaj de la Kasisto D-ro G. Johnston (London) pri la nuna stato de la Asocio.

II. — Demando pri la Statuto de T. E. K. A. (projekto de D-ro L. Chybczynski; vidu la N-rojn 2, 3, 4, 5 de „Oficiala Bulteno“).

III. — Demando pri la Medicina Ĵurnalo, eldonota de T. E. K. A. mem (raporto de la Redakcia Komitato).

IV. — Demando pri la partopreno de esperantistoj kuracistoj en la Internacia Londona Kongreso Medicina de la jaro 1913.

V. — Proponoj:

1) Ke T. E. K. A. aliĝu kiel faka organizaĵo al U. E. A. (D-roj E. Sós, Wien, kaj K. Weiss, Schwáb.-Gmünd).

2) Ke la anoj de T. E. K. A.-estraro pagu jare nur la diferencon inter la kotizo kaj faritaj de ili elspezoj (D-ro H. Šipek, Luhačovice, Moravio).

3) Ke oni altiru al T. E. K. A., kun la celo de financa helpo, entreprenojn, kiuj dependas de la subtenado de la kuracistoj (sanatorioj, klimataj kaj banaj kuraclokoj kaj iliaj hoteloj kaj pensionoj, ĥemiaj, kuracnutraĵaj, kuracilaj fabrikoj, drogistoj, eldonistoj kaj vendistoj de medicinaj libroj kaj ĵurnaloj k. t. p.) (D-ro H. Šipek).

4) Pri senpaga loĝado kaj pensio de vojaĝantaj kuracistoj en hospitaloj kaj kuraclokoj (D-ro H. Šipek).

5) Pri internaciigo de kuracistaj diplomoj (D-ro H. Šipek).

6) Ke oni fondu naciajn kuracistajn societojn por la enlanda esperanta propa-

gando (D-roj K. Šidlovskij, Moskvo, kaj E. Rothsuh, Aachen).

7) La kuracista fakliteraturo kaj Esperanto (D-ro K. Weiss).

8) Aliaj proponoj farotaj.

B) Scienca parto.

RAPORTOJ:

I. — D-ro E. Sós (Wien): La konservado de dentoj kun malsaniĝinta pulpo.

II. D-ro A. Fiŝer (Tiflis): La diagnozado kaj ĥirurgia kuracado de ekstertera gravedeco.

III. — D-ro J. Dubrowitz (Varsovio): Pri 606.

IV. — D-ro W. Broeckert (Antwerpen): La temo estas rezervita.

V. — D-ro J. Gelibter (Zamość): La temo estas rezervita.

Krom tio, T. E. K. A. aranĝas dum la Kongreso publikajn prelegojn pri popularaj medicinaj temoj por la Kongresanoj. Cis nun estas anoncitaj jenaj prelegoj:

1. D-ro A. Fiŝer (Tiflis): Strumo kaj kretenismo en Svanetio (kun lumbildoj).

2. D-ro Rafael de San Millan (Madrid): Gimnastiko kaj atletaj sportoj.

3. D-ro Fels (Lvovo): Unua helpo ĉe sangado.

4. D-ro E. Sós (Wien): Pri la historio de dentkuracado kaj tekniko de artaj dentoj.

Vi vidas, kolegoj, kiel multampla estis nia programo, kiom da gravaj precipe organizaj demandoj ĝi enhavas. Do venu la Jubilean Kongreson grandare, por partopreni la diskutadon kaj fari decidojn, kiuj sukcesigus al T. E. K. A. ĝian ĉiaman iradon antaŭen!

La Centra Komitato de T. E. K. A.

Telegramoj el la Mondo.

El Austrio.

Aŭtomobila okazintaĵo. (Vieno). En XVIII kvartalo ĉe strato Neuwaldegg, hieraŭ vespere renversigis la aŭtomobilo. La pasaĝeroj grave vunditaj, la ŝofero estas sen vundoj.

Mont-oferoj. (Trieste). Dum montara ekskurso tri oficiroj kaj unu unujara volontario *falis* de granda alteco. La volontario mortigis, la oficiroj ricevis gravajn vundajn.

Mara katastrofo. (Pola). En torpeda ŝipeto „Gaea“ rompis la tubo, trakondukanta la vaporon el la kaldronoj. La tri maristoj estis tiel grave vunditaj, ke ili post kelkaj horoj mortis.

El Kroatujo.

Verdikto en la proceso de Jukić. (Zagreb-Agram). Hodiaŭ je 11 matene oni publikigis la verdikton en la proceso pri la atenco kontraŭ la bano de Kroatujo.

Studento Jukić estis kondamnita al mortpuno per la pendigo. Akuzita kroato estas kondamnita por 6 j. de grava malliberejo, akuzitaj Cvijic, Casarec, Bubrić Neudhardt kaj Horvatin ĉiu per 5 jaroj de malliberejo, Zarinić per 6 monatoj de la malliberejo. Kvar akuzitaj oni liberigis de la kulpo kaj de la puno.

El Turkujo.

Tertremo. (Konstantinopolo). Tertremo, kiu okazis en Dardanela markolo kaj en ĉirkaŭaĵo de Marmora marbordo, faris grandegan dezertigon. La urbo Gallipoli estas dezertigita. Kora, Krassia kaj Herklisa bruligita, la urbo Myrinphilo renversigis. Oni kalkulas, ke pereis kaj estas vunditaj pli ol 1000 personaj. En la urbo Kalesi disfalis la rusa konsulejo. Ministraro helpdonis al la oferaĵ de malfeliĉo 3000 turkaj funtoj.


Infera maŝino. (Saloniko). Hieraŭ je la 10. horo vespere eksplodis en ĉi-tiea

aŭstria poŝtoficejo infera maŝino. La ejo detruita, sed la leteroj kaj sendaĵoj estas savitaj. La polico serĉas energie la krimulon.

El Rusujo.

La vizito de S-o Poincaré (Petersburgo). Geimperiestroj akceptis la S-on Poincaré en Peterhofo. La imperiestro distingis lin per la ordeno de Aleksander Nevski. Oficiale oni neas, ke la afero Dardanela estis preparolata. Oni diras, ke la rusa registaro intencas preni la novan printon. Tion neas tute decide la ministerio de financoj.

Krakova Tramo.



Anoncoj.

JAM APERIS UNUTAGAĴO

„Politika Malliberulo“

Priskribanta la vivkondiĉojn de politikaj malliberuloj en Rusujo.

Aĉetebla en librejo FR. EBERT
Krakovo str. Floryńska 35.

PREZO

KR. 0-60. SM. 0-25.

I. kaj r. patento Nr. 41589.

Mirinda eltrovo por suferantaj je la hernio
Nov-eltrovita saniga


Hernia zoneto

apud kiu konsistante el du partoj peloto ne surprenas hernian malfermaĵon, sekve ne elprenas inteston internen, kio povus kaŭzi diversajn intestajn suferojn, kiel okazadis ĉe la ĝisnunaj zonetoj. Ĝi kaŭzas bonan situacion de l'intestoj en la ventra kavoj. Eĉ por la plej ekstrema sufero ĝi estas tre facilpeza, sen risorto aŭ metalo ĝi estas portata sen doloro kaj ĝi subtenas radikale. Oni sendas klarigon post ricevo de poŝtmarko; elsendo senprokrasta.

M. I. Kantorowicz,

Podgórze strato de Józefińska 6.

Filioj: Varsovioj, Sosnowice, Vieno.



aldono al »ILUSTROV

Redakcio, Administracio kaj Ekspedicio
Kraków, str. Karmelicka, l. 16.
Telefono 1198.

Gefredaktoro kaj eldonisto *Maryan
Dąbrowski.*

Nr. 3. KRAKOV

Esperanto kaj patriotismo.

Origine verkita de **Adam Zakrzewski L. K.**
(Rusa Polujo).

Ni, esperantistoj, aŭdas ofte riproĉon ke nia laboro estas danĝera por lingvoj naciaj, ĉar ni penas anstataŭigi ilin per unu lingvo universala, tutmonda. Por naciaj lingvoj ni ne lasas eĉ plej malgrandan lokon! Tiamaniere, oni diras, ni intencas detrui naciajn sentojn! ni neniigas patriotismon!

Parolante serioze, tiaj intencoj, se ili ekzistus, estus sensencaj infanaĵoj, pri kiuj certe neniam okupis sin maturaj homoj. Tion neniam celis diversaj aŭtoroj de lingvoj internaciaj nek multenombraj adeptoj de tiu ideo.

Esperantismo ne estas ia politika aŭ socia doktrino, sed nur lingva afero. Esperanto estas kreita por faciligi rilatojn inter diverslingvaj homoj, al kiuj ĝi tute ne intencas forpreni iliajn lingvojn naciajn. Ĝi restos por ĉiu lingvo fremda en sama grado, en kiu estas fremdaj ĉiuj lingvoj krom la patra. Se la ellernado de lingvo latina aŭ angla ne ŝajnas al ni kontraŭa al niaj naciaj sentoj kaj akordiĝas kun plej varma patriotismo, kial nur unu fremda lingvo, Esperanto, estas konsiderata kiel terura por tiuj ŝatindaj sentoj?

Laŭ opinio de kelkaj personoj la lingvo internacia eĉ ne devas esti uzata por originala poezio aŭ literaturo. Sro. Bollack, aŭtoro de bela verko pri tiu ĉi demando eĉ skribis: „estus tute sufiĉe, se ni povus traduki en lingvon internacian la Geometrian de Euklides kaj numeron de „Times“ (tiu ĵurnalo ne havas felietonojn nek poezion). Tradukoj de sciencaj verkoj, leteroj privataj kaj komerca korespondo inter diverslandanoj, buŝaj komunikaĵoj kun fremduloj, ĉiuj unuvorte okazoj, en kiuj ni hodiaŭ devas nin turni al tradukaĵoj kaj tradukistoj, — jen estas antaŭ ĉio la kampo de lingvo internacia.

Scienculoj, kiuj bezonas koni staton de siaj specialaĵoj en aliaj landoj kaj devas pro tio ellerni multajn lingvojn fremdajn, — komercistoj, subtenantaj rilatojn kun diversaj landoj, — eĉ modestaj metiistoj, forveturantaj en eksterlandon por plibonigi sian metion, — fervojistoj, hotelistoj, restoraciaj servistoj, ricevantaj ĉiutage fremdulojn, — ili ĉiuj kvankam tute bonaj patriotoj, sentas pli kaj pli forte hezoron de lingvo internacia.

Tio estas praktike la plej grava, reala flanko de la demando. Ĝi, kompreneble, havas nenion kontraŭan al patriotismo.

Se tamen okaze aperos iam talentplenaj poetoj aŭ romanverkistoj, kiuj skribos Esperante belegajn poezion, rakontojn aŭ

Sonas vigle signaloj,
Jam vekigas la valoj:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Bruas supro granita;
La Junedzo, vekita,
Matenruĝon elsendas,
Karan vorton atendas:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Iras ar' amikina
Al la hejmo estrina,
Iras kun la rozfloro
Al reukout' de l' aŭroro:
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

La Junedzo sin zonas,
Mondo kantas kaj sonas;
Venas jun-amikaro,
Grakas roka aglaro:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

— Ĝis nun ombroj ne cedas,
Nokto forton posedas;
Dormas akvoj en maro,
Ĝis nun dormas homaro:
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

La Popoloj-Lazaroj
Songas ĉe la altaroj
Pri la tago radia,
Reviviĝo la sia:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

La Junedzo atendas,
Du riverojn li sendas;
Ili iras en landon
Kaj ripetas demandon:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Diru, ondoj, resone:
Ĝi jam preta duone;

RESA BULTENO

«DZIENNY» al n. 184.

La „Kongresa Bulteno“ eliras ĉiutage dum la kongresaj tagoj je la 6a horo vespere.

La redaktanta Komitato:
L. Kronenberg, E. Pfeffer, A. Czubyński

STO 1912. Nr. 3,

Jam sur frunto granita
Fajra krono plektita,
— Nur ne estas, nur ne estas festa robo finita.

La torentoj refluas,
Fermas pordojn, krakbruas,
Knaras pordoj el ŝtono,
Surde ĝemas resonoj:
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

Vent-orgeno jam bruas;
La Junedze enuas;
La Monah', en talaro,
Ringojn tenas por paro:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Tra ventegoj, silentoj.
Balanciĝas la gentoj;
Paŝas tempo sealima.
Muĝas tondr' malproksima:
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

En abismoj, vekite,
La popoloj ekscite:
— Malfermadu! — laŭtkrias,
Tag' ekstere radias!
— Devas esti, devas esti Junedzino jam preta!

Junedzino nubiĝas,
Per vualo kovriĝas:
— Ho, malbono ne cedas,
Ĝis nun forton posedas!
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

— Kiam tagon de l' juĝo
Korn anoncos kun muĝo,
Kiam kradoj diskrevos,
Fundoj lumon ricevos,
Kiam levos sin valo,
Pintoj krakos dum falo,
Juĝa tondro ekbruos,
Duon-mondon detruos,
— Tiam estos, tiam estos Junedzino vestita!

Esperantigis *Antoni Grabowski.*

638 personoj. Ge tiu okazo oni devas akcenti, ke la restoraciisto sinjoro Wójcik, kiu entreprenis aranĝi la bufedon, perfekte plenumis sian taskon.

La hieraŭaj konsiliĝoj kongresaj. Je la 9. matene komenciĝis la kunsido de U. E. A. kun partopreno de pli ol 400 personoj. Prezidis Sinjoro Bolingbroke Mudie (Anglujo); ĉeestis la Majstro. Oni preparolis la aferojn de la asocio.

Samtempe je la 9. matene estis kunsido de la sekvantaj sekcioj: Germana Esp. As., katolikoj, liberpensuloj, teknikistoj, ĵurnalistoj, okultistoj, maristoj, teozofoj, farmaceŭtoj, la Ruĝa Kruco; je la 2¹/₂ posttagmeze komencis labori la sekcioj: kuracistoj, instruistoj, juristoj, bankoficistoj, poŝtoficistoj kaj komercistoj.

La unua plena kunsido de la Kongreso okazis en la salono del Malnova Teatro je la 3a posttagmeze. Prezidis Dro. St. Mikołajski (Lvovo). La devojn de sekretario plenumis Sinj. Chavet (Parizo). Post tralego de la raporto de l' dimanĉa Inaŭguracia kunsido, oni mallonge diskutis pri la projekto de la laborprogramo de „la Oka“. La programon antaŭmetis la Konstanta Kongresa Komitato el Parizo. Post la referato de la delegito Bolingbroke Mudie (Anglujo) oni unuanime akceptis la projekton.

Laŭvice venis sur la tagordon la afero pri la pagoj de apartaj societoj al la Centra Oficejo en Pariza. Kiel oni scias, ĝis nun la societoj pagis nenion, kaj la Konstanta Kongresa Komitato estis subtenata de la oferemeco de generalo Sebert, la membro de l' Pariza Akademio. Dum la hieraŭa kunsido oni faris proponon, ke la Societoj pagu de ĉiu „rajtigita delegito“ po 2 Sm. por la „Centra Oficejo“. En pli longa diskuto voĉprenis la sekvantaj delegitoj: Bolingbroke Mudie (Anglujo), Sharpe (Francujo) Mikołajski (Polujo) Sergeant (Francujo), Behrendt (Germanujo), Chrestanof (Bulgarujo) Frenckell (Germanujo) Levy (Rumanujo) kaj prof. Bourlet (Francujo), kiu antaŭmetinte la preliminaron buĝetan por la Konst. Kongresa Komitato en la sekvanta jaro en la sumo 5000 Sm. kaj eldirinte dankon al la generalo Sebert (ne ĉeestanta la „okan“) — deklaris, ke li estas por la impostpagado al la Konstanta Kongresa Komitato. Je tio finiĝis la diskutado kaj oni prokrastis ĝin ĝis la sekvanta Kunsido. Post kiam Sinj. Chavet tralegis la telegramojn kun gratuloj, senditajn hieraŭ al la Kongresa sekretario oni je la 5a vespere ĉesigis la laborojn.

Sekcio okultista, kiu kunvenis hieraŭ, prezidata de Sinj. Stas el Belgujo, okupiĝis pri la kvestio de iu mediumo, parolanta en transo per tute nekonataj lingvoj: ĥina, japana, el la libroj Zenda Vesta kaj aliaj. La Sekcio troviĝas en Rynek (ĉefplaco), Nr. 43, etaĝo III.

La Ekspozition de Esperanto, malfermitan de hieraŭa tago vizitis ĉirkaŭ 700 personoj. La ekpozicio estos vizitebla dum la tuta kongresa semajno de la 9. matene ĝis la 12. tagmeze kaj de la 3. posttagmeze ĝis vespero.

kaj ke oni havas tie ĉi Akceptejon, kian li ankoraŭ ne vidis. Pli bone aranĝitan li eĉ ne povas esperi. »Ni kredu — li konkludas sian rimarkon — ke ankaŭ la estontaj kongresoj esperantistaj estos aranĝataj en simila maniero«.

„Mazepa“ esperante.

La prezento de «Mazepa», okazos merkrede la 17-an en la urba teatro. La krakovaj artistoj, partoprenantaj en la prezento, estas jam alveturintaj Krakovon kaj komencis la provojn, kiuj estas farataj ĉiutage. En la apartaj roloj elpaŝos la sinjorinoj: Wysocka (Amelio) kaj Krysińska (Kastel-estrino); kaj la sinjoroj: Sosnowski (vojevodo), Stanisławski (Mazepa), Maryański (Zbignjev), Jednowski (reĝo), Węgrzyn (Hmara), Biegański (sendito), Kaj Nowakowski (Hjonstka).

La hieraŭa prezentprovo montris, ke la artistoj dum la libertempo jam tute ekregis siajn rolojn, same en memora kiel ankaŭ en lingva rilato. La ĝenerala provo estos direktata de Sinjoro Antoni Grabowski.

Dum la prezento estos dancita polonezo kun la partopreno de la opero el Lvovo.

La prelego de Howard. La kreinto de ĝardenurboj Howard venis hieraŭ Krakovon el Letchwort kaj prelegos pri la anoncita temo merkrede la 14-an je la 5. posttagmeze en la teatra konstruaĵo en la arkitektura ekspozicio. La prelego estos ilustrata per lumbildoj de ĝardenurboj fonditaj en Anglujo.

Prelega rekordo. La kaliforniano D. E. Parrish el Los Angeles ĉeestas ankaŭ »la okan«. Parrish forlasis Kalifornion en aprilo de 1911 j. kaj travojaĝis la mondon, prelegante pri sia lando sole per Esperanto. Ĝis nun Parrish estis en 25 landoj kaj havis entute 125 prelegojn. Kalifornion revenos Parrish en la venonta oktobro.

Invito al vetkuroj. Regimento de dragonoj Nr. 12 sendis al la sekretario skribajon, invitantan la partoprenantojn en la kongreso al vetkuroj de ĉevaloj, okazontaj jaŭde la 15-an je la 5-a posttagmeze.

Unuvorte sukceso super ĉiun esprimon.

Kunveno de studentoj, el ĉiuj universitatoj, okazis post la koncerto en la kafejo de Michalik. Oni faris kelke da paroladoj tamen ia definitiva konkludo aŭ decido ne estis ankoraŭ proponita. Oni decidis ankoraŭ unu fojon kunveni.

Kongresa poŝto kaj banko. En la kongresa banko dimanĉe estis la monŝanĝado pli granda kaj vigla ol sabato. Ĉi-tiufotoje oni interŝanĝis plej multe da frankoj, poste dolaroj kaj funtoj sterlingaj. Ĝekoj kaj akreditivoj estis plejparte amerikaj, estis ankaŭ anglaj kaj leteroj el Francujo kaj Germanujo. Pro tre forta movado dum la dimanĉo oni fermis la kontoron nur ĉirkaŭ la 6a. posttagmeze. Hieraŭ estis la banka kontoro malfermita la tutan tagon — antaŭtagmeze oni ŝanĝis je aŭstria mono tre multe da rubroj.

La poŝta movado estis dimanĉe kaj lunde ekstreme vigla. Laŭ proksimumaj pri-kalkuloj tra la poŝta kesto de la kongreso oni ekspedis ĉirkaŭ 5000 leteroj kaj poŝtkartoj. La ĉambro por korespondado, aranĝita por la kongresanoj estas en momentoj liberaj de kongresaj laboroj konstante plena. En tiun ĉi ĉambroon por dispono de la kongresanoj donis la komitato senpage leterpaperon kun konforma surskribo. Dum la dimanĉo kaj lundo oni uzis pli ol 1900 foliojn da tiu papero.

Koresponda librego por la kongresanoj. En Akceptejo, en la kongresa kancelario, oni elmetis por la partoprenantoj libregon, en kiun la kongresanoj skribas siajn rimarkojn. En tiun ĉi libregon la prezidando de U. E. A. Bolingbroke Mudie skribis tre favoran kritikon koncerne la aranĝon de la kongreso. Li volas tie rimarkigi, ke tie ĉi en Krakovo ĉio estas bonege aranĝita

Lingva Babel kaj Krakowa Wawel.

La legendo pri Babel montras la gravecon de la lingvo por la homa reciproka harmonio kaj ilia laboro. La puno per kiu Dio volis puni la ĉielon stremantaj homoj estis la intermikso de iliaj lingvoj. Kiam oni instruas infanojn tiun legendon, kompreneble el lingvista vidpunkto tre naivan, oni ne vidas en ĝi grandan simbolecon. Oni ne eldedukas el ĝi la sekvojn: se diverslingveco estas laŭ tiu legendo tiela malbono, kiel granda bono prezentus unu lingvo, kiu estus konata de ĉiuj homoj? Ĝi estus kvazaŭ la simbolo ke venas de nove la momento, kiam la homoj fariĝas tiel potencaj, ke dioj timas ilin. Ili denove konstruas novajn Babelajn turojn, jam ne sur unu loko, sed ĉie sur la mondo, venkante la malfavoran influon de la naturo ne per forflugo al la suproj, kie oni ne povus vivi cetere sen la greno, kaj terproduktoj, se per turnado kaj eluzado de teraj fruktoj kaj influoj per homa profito.

Sed ne sur ĉiuj punktoj oni konstruis tiujn, turojn por atingi la sunon, klerecon kaj minaci al la potenco de dioj, kiuj kvankam efektive ne egzistis en realeco, tamen egzistis kiel la produktoj de la fantazio, kaj kiel tiaj, ili influis sammaniere al la homoj kvazaŭ ili estus vivantaj. Nune ni klare vidas ke ilia potenco estis nur la homigitaj fortoj de naturo. Sekve dioj estis naturo, kies malamika influo pli malpligrandiĝis, jupli pligrandiĝis homa supremacio super la naturo. Naturo kaj homaro estis kvazaŭ du fortoj sin reciproke kontraŭbatalantaj; kelkfoje sukceso la Naturo-Dio forrabi la jam akiri-

tan potencon de homaro, kiu denove fariĝis malforta, tamen post iu tempo, komencis la homaro denove batali kun la naturo, por denove atingi la supremacion oni denove komencis konstrui simblan Babelon.

Nune la subjugo de naturo, t. e. kulturo komencita sur ĉiuj punktoj de nia globo donis la naciajn kulturojn, naciajn Babelojn, kune harmonie celantaj al la sin-tezo en la familio de ĉiuj nacioj.

La naciaj kulturoj alcentriĝas sub nacia standardo, internacia, tuthoma kulturo fariĝanta komuna homa fundamento alcentriĝas sub verda standardo de esperanta Homaro, — esperanta en ambaŭ vortsencoj: lingva kaj simbola.

Oni almasonas lastajn brikojn, por atingi eternan lumon eĉ se unu el naciaj Babeloj ne atingas aliajn pli superajn, ili ricevas de ili la lumon forrabitan de aliaj el la ĉielo.

Unu el tiuj Babeloj, en naciaj kulturoj estas nia pola Babelo, kies koron vi trovas en la sanktejo de Krakovo kaj de la Polujo, nomata Wawel, kiu estas la sama vorto trovebla en diversaj landoj de hindo-europa elemento, kiu plej vigle celas al subjugo de la naturo. Tiun nomon vi trovas en Urropotanio kaj en Besarabio (Rusujo), kie apud maldekstra flanko de Danubo troviĝas lago Jaŭpuch, sur kies bordoj orientaj troviĝas urbeto Babel; Vi ĝin ankaŭ trovas en aliaj lokoj, ekz. apud Potsdam, kiel 78 m. altan monteton, en Rusujo kaj Finlando.

Estante en Krakovo, en urbo de korvoj grakantaj ĝoje supre de la kadavro de mortigita Wawela legenda Drako, formanganta lian loĝantaron, rememoru, ke ĝi fine estis mortigita, ke egzistas ankoraŭ popolo batalanta por sia kultura memstareco malgraŭ malbonaĵoj, kiuj kontraŭstaras al ĝi survoje, rigardu nian sanktejon sur Wawel, rememoru nin, ke ni volas kune kun aliaj kulturoj, en kvietaj harmonio, venkadi la naturon kaj elsiri el ĝiaj dioj la potencon, por ĝin mem uzi.

Antoni Czubyński.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ.

Jus eliris Verko: „*Esperanta-Pola kaj Esperanta Litova Bibliografio*“ de ro Z. Adam. Ĝi en havas priskribon de esperantaj kaj pri-esperantaj Verkoj de polaj aŭtoroj kaj de polaj tradikantoj. Ni Varme rekomendas tiun ĉi verkon ne nur al niaj polaj samideanoj, kiujn ĝi interesas speciale, sed ankaŭ al ĉiuj esperantistoj, kiel bonan modelon por samaj verkoj por aliaj naciaj-esperantaj literaturoj. Aĉetebla en la Vendejo de la Akceptejo kaj ĉe librejo Gebethner (Rynek).

Postkongresa ekskurso.

Al montamantoj.

Esperantistoj el Rožnov (Moravio) aranĝas dimanĉe la 18-an unutan ekskurson en Beskidojn por samideanoj, kiuj volas ekkoni la plej belan montaron de Moravio. Tre oportuna por kongresanoj, kiuj veturos al Vieno aŭ Praha. Sole 5-hora piedirado. Elspezoj tre malgrandaj. Prezo de vojaĝo la sama kiel se oni veturas per rekta linio. Programo: Forveturo de Krakovo dimanĉe je la 6:52 h. m. alveturo al Frenštát je la 12:35 h.

Marŝado de Frenštát al „Pustevná“ („Ermitejo“), belega somera libertempejo 1018 m super marnivelo, vilaoj en popola bohema stilo. Tagmanĝo en „Pustevná“ je la 3^a horo. Unuhora montara promenado al monto Radhošť (1130 m alta, vastega ĉirkaŭrigardo: oni vidas duonon de

Moravio kaj parton de Silezio kaj Hungario). Malsupreniro al Rožnov (klimata sanigejo). En Rožnov oni pasigos la nokton kaj matene je la 5:30 h. oni povas forveturi al Hulin (Hullein), kaj de tie al Vieno (alveturo je la 12:35 h. t. m.) aŭ al Praha (alveturo je la 2:48 h. t. m.). Pluajn detalaĵojn komunikas kaj aliĝojn akceptas Josef Friedrich, juristo el Rožnov. „Studenta Hejmo“, str. Radziwiłłowska.

LOKA KRONIKO.

Ke la Krakova Organiza Komitato pri la alvenontaj Krakovon gesamideanoj verege zorgis, oni povas plej bone vidi el malsupre citita korespondaĵo de unu el plej konataj samideanoj, kiun li skribis en la korespondaja libro de la Akceptejo.

„Mi volas rimarkigi, ke tie ĉi estas la plej bone ordigita Akceptejo, kian ni ĝis nun havis.“

Pli bonan oni ne volus esperi. Ni do fidu, ke estontaj estos egale bonaj. *Bolnbroke Mudie*, prezidanto de U. E. A.

Fotografajoj. Gies atenton kaj admiron kaŭzis la fotografajoj kaj la poŝtkartoj, liveritaj por la Kongresanoj de oficialaj fotografistoj kongresaj. Pješhalski kaj Gargul. Tiuj ĉi samideanoj, samtempe profesiaj fotografistoj, pretigis laŭ la demetitaj hieraŭ kliŝaĵoj jam por hodiaŭ la fotografajojn. Malgraŭ mirinda rapideco la fotografajoj estas bonegaj kaj de ĉiuj kongresanoj velonte aĉetataj. Araĵ fotografajoj en la formato 30+40 kostas kvin kronoj, la poŝtkartoj estas disvendataj po 30 heleroj. Ki estas riceveblaj en la vendejo de Komerca Akademio (II. et.). Hodiaŭ matene oni faris kliŝaĵojn de la esperantistaro ĉe monumento de Mickjevič: le pretaj fotografajoj estos aĉeteblaj morgaŭ de mateno ankaŭ en la vendejo. Koncerne la kongresan albumon ni estas petataj pri informo, ke la albumo estas jam afero tute certa; ĉiu, kiu volas havi ĝin, bonvolu kiel eble plej baldaŭ mendi ĝin en la Akceptejo. Eĉ la ne mendontoj estas petataj doni por la albumo siajn fotografajojn. *Kr.*

Sinjorino kiu perdis sian valizon en la stacidomo, povas ĝin ricevi en la akceptejo ĉe stacidomo.

Oni serĉas samideanojn kiuj post la kongreso vojaĝus Budapeŝton, Vienon kaj Praha n. Restigu Viajn adresojn en Akceptejo por kongreskarto 196.

Por la kongresanoj veturontaj al Praha! En nomo de la „Bohema Landa Ligo por la akcelo de la turista movado en Bohemujo“ estas invitataj ĉiuj kongresanoj oficiale, ke ili vizitu ĉe sia revena veturo la ĉefurbon Praha, kie ili estos plej gastame akceptitaj de la Centra Asocio Bohema Unio Esperantista. Turniĝu al del. U. E. A. s-o Ed. Kühnl, red. de *Časopis Čes. Esp.* (En Kraków: Grand Hotel). Uzu por la vizito la esper. Gridlibron tra Praha, kiu ricevis en Barcelono la I-an premion de U. E. A., postulu la II. eid. de la Gvidfolio tra Praha, eldonitan de la turista ligo kaj aĉetu lo poŝtkartojn de Praha kun esperanta teksto (1 serio: 20 bildoj: 1 K) en la kancelario de Bohema Unio Esperanto en Praha II, Vodičkova ul. 38. — Kiu volos, ke la ĝejo estu por li en Praha antaŭmendita (por 3 K tage) skribu al Kongresano s-o Ed. Kühnl, kiu tuj respondos.

Hodiaŭ marde okazos post la reveno el Wieliczka kunsido de esperantistaj ĵurnalistoj en Ĵurnalista ĉambro de la Komerca Akademio Kunsidon aranĝas la Redakcio de „Kongresa Bulteno“.

Morgaŭ t. e. merkrede je la 5 horo posttagmeze okazos en la teatra salono de la „Arhitektura Ekspozicio“ lumbilda parolado de Sro Ebenezer Howard el

Letchworth pri „Ĝardenurboj Ĝiuj kongresanoj estas kore petataj aĉesti la paroladon de tiu eminenta kaj glora samideano!“

Surakva festeno aranĝata de la Krakova Societo de Sokoloj okazos morgaŭ, la 14-an kun tre interesanta programo. Kunmetos ĝin la muziko de Sokola orkestro, la revuo de la plej bonaj boatoj de la Sokola remista grupo, horo Sokola artaj fajraĵoj, kolora lumigo de l'kastelo Wawel k. t. p.

Esperantiaj Karavanoj

La Esperantiaj Karavanoj Paris-Kraków kaj Lyon-Kraków, konkataj de S-roj Gé (Subdel. de V. E. A.) kaj Poncet (Kons. de U. E. A.) alveins dimanĉon frumatene en la Kongresurbon. Ili estis vizitintaj la tri belajn urbojn München, Salzburg kaj Wien. Ĝie ili estis kore akceptataj de la Distriktaj kaj Lokaj Delegitoj de U. E. A., kiuj ĉion plej bone aranĝigis. Ĝia malfacila entrepreno estis ebla nur dankal plena sindonemo de ĉiuj Esperantianoj. Apartan dankemon ŝaldas la partoprenintoj de la Karavanoj al S-roj Cressol, Mayerhauser, Pesleder, Sós kaj Glück.

Kredelle U. E. A. organizos alian Karavanon por la forveturo el Kraków. La interesatoj bonvolu legi la Kongresan Bultenon.

L. Poncet,
Konsulo de U. E. A.

El Krakovaj legendoj.

Wanda, ĉevaleto de Zwiejnyiec, Twardowski.

(Daurigo).

Krak havis filinon, Wanda. — Kiam oni volis ŝin devigi, ke ŝi edziniĝu kun germana kavaliro Rydygier minacinta per milita invado, ŝi preferis sin dronigi, kion ŝi efektivigis. — Sia persono estas same mitologia kaj trovebla en rakontoj de aliaj popoloj. Oni trovas ŝin en grekaj rakontoj sub nomo „Bendis“, kies feston aĉestis Sokrates en Pireo, kiel tion rakontas Plato. — Ŝi estas same renkontebla en nordaj rakontoj sub nomo de Vanadis.

Apud Krakovo troviĝas termontetoj, unu de Krak, la alia de Wanda, kiujn ŝutis homoj, portintaj la teron en manikoj. — Ĝis hodiaŭ oni festas „manikan feston“ en dua tago de Pasko.

Kun tiu mitologia persono oni volis kvanigi kelkfoje alian idolanan feston, havantan versajne apartan devenon, nome „Florkronojn“ (Wianki). — La 21-an de junio la eklezio festas S-tan Johanon Bapeno. En tiu tempo okazas somera soleno, kiun oni festis per fajraĵoj, nomataj „Sobotki“ laŭvorte: solecaj lokoj. — Sur kamparoj oni bruligadis lignarojn, kiujn oni transsaltadis kaj ĉirkaŭdancadis. Tiu fajro havas laŭdire purigan econ. Se iu estis sorĉita de iu sorĉistino, tiu devis trinki la akvon, en kiun oni jetis brulantajn ŝtipojn el tiu lignaro, por forpeli la malbonan influon de la sorĉoj. Riverojn oni purigis per jetado de kronetoj fiksitaj sur breto, en kies mezo brulis kandelito. Poste oni lavis sin en tiu akvo, kio purigis ne nur la korpon sed ankaŭ la spiriton.

Pro tio oni ankaŭ nomis tiun feston „Kupala“ de la malnova slava vorto, ekzistanta ankoraŭ en bohema kaj rutena lingvoj „kupal“ bani.

Dum tiu festo polaj junulinoj jetadis de ambaŭ bordoj kronetojn sur Vistulon kaj kies kroneto ne dronis, tiu el ili povis esperi ricevi edzon en tiu jaro.

Oni ludis kaj kantis dum tiu nokto, plena de esperoj kaj feliĉo.

La katolika eklezio volis tiun idolanan

feston ekstermi kaj multfoje la episkopoj kaj pastroj ĝin malpermesis; sed tiu penado restis sen efiko kaj la bela, poeziplena festo vivas ĝis hodiaŭ, kvankam jam ŝanĝita kaj lukse aranĝita kun artefaritaj fajraĵoj, dancoj sur remŝipoj k. t. p. — En unu tago de jaro, fine de junio, kiam la vetero estas serena, amasiĝas sur ambaŭ bordoj de Vistulo la tuta loĝantaro de Krakovo kaj atendas la vesperigon. Kiam sur ĉielo brilas jam steloj kaj la luno arĝentigas ondojn, tiam je donita signalo komenciĝas la festo, daŭranta kelkajn horojn kaj finiĝanta per iluminado de kastelo de mita Krak.

La 28. VI. okazas en Krakovo katolika procesio. Post ĝia finiĝo loĝantaro rapidas al alia idolana festo, tiel nomata „ĉevaleto de Zvjeynjec“ (Konik Zwierzyniecki).

Ĉirkaŭ la jaro 1281 dum regado de Lešek la Nigra okazis tria invado de Tataroj, alvenintaj ĝis Krakovo kaj detruintaj ĉion survoje laŭ sia bone al ni konata kutimo. En danĝera momento, kiam la savo de la urbo ŝajnis preskaŭ neebla, unu flosisto kolektis siajn kamaradojn, kuragiĝis ilin al batalo kun la barbaroj kaj en triumfo revenis en la urbon kiel venkinto, ĝoje salutata de la savita loĝantaro.

De tiu tempo oni festas tiun iluzian invadon. Homo tataro vestita kun longa barbo, sur ligna ĉevaleto ornamita per duonlunoj invadas Krakovon el la kartalo Zvjeynjec, nune jam apartenanta al la urbo. — Li estas ĉirkaŭita de tataro vestitaj muzikantoj kun duonlunoj sur soldataj ĉapeloj kaj de halebardistoj portantaj standardojn kun ĉevalvostoj. Per bastono li batas la forkurantajn geknabojn kaj alveninte al la episkopa palaco, li salutas la episkopon per la klinigo de standardoj kaj ricevinte monon li revenas al la regalo kun kamaradoj.

Malgraŭ ke oni fiksis la daton je la jaro 1281, tamen tiu festo devenas plej verŝajne el idolanaj tempoj. Mirinda estas tiu detalo, ke en ĝi ludas pli gravan rolon la ĉevalo ol la rajdanto, kies nomo malaperis. Li invadas la urbon, same kiel trojana ĉevalo kun Ahivoj en sia ventro invadas Trojon. Tiu detalo estas pure mitologia, ĉar strategie ĝi estas tre naŭva kaj neebla. Krakovon defendas flosistoj, kies vivo forfluas sur rivero. Same ĉe Grekoj la ĉevalo estas dediĉita al Dio Posejdon, malamika al Trojanoj.

La ovacio al episkopo povas esti ŝanĝo de ovacio, kiu iam estis farata al antikva idolana ĉefpastro. Poste oni unuigis tiun miton kun tataro invado, kiu estis tre kruela kaj tute dezertigis la landon.

Oni rakontas ankaŭ pri kaverno apud Krakovo, en kiu vivis laŭ legendo majstro Twardowski, alĥemiisto kaj sorĉisto, kiu eble estas ankaŭ ne historia persono. — Li forvendis sian animon al diablo por la servoj, kiun tiu ĉi lasta devis al li fari, plenumante ĉiun lian deziron, kondiĉe ke li post forpaso de difinita tempo alvenos al Romo, kie Mefisto prenos lian animon. Sed kiam la limtempo pasis kaj Twardowski ne pensis pri la vojaĝo al Romo, li troviĝis hazarde en unu gastejo, ne sciante, ke ĝi estas nomata „Romo“. Kiam aperis tie la diablo, postulante plenumon de la kontrakto, Twardowski, por sin defendi prenis el lulilo suĉinfanon, filon de l'gemastroj, por dank' al ĝia senkulpeco malebligi al la diablo alpaŝon al si.

Tiam la diablo rememorigis al li lian nobelan honoran vorton per kiu li garantiis al li plenumon de la kontrakto, skribita per propra sango sur bova ledo. La hontigita Twardowski remetis la infanon en la lulilon kaj la diablo, preninte lin, volis kun li forflugi al la luno. Dume Twardowski komencis preĝi litanion al S-ta Virgulino, pro kio la diablo lin for-

lasis kaj Twardowski ekpendis inter la tero kaj la luno. Laŭ popola kredo tiu stato daŭras ĝis la hodiaŭna tago. — Alia legendo rakontas, ke Twardowski troviĝas sur la luno.

Antoni Czubyński.

Telegramoj el la Mondo.

— El Bohemujo.

Pfialtigo de prezoj por karbo (Praha). La grandaj karbo-entreprenistoj anoncis la plialtigon de prezoj por karbo de 14—16 heleroj por 100 kl. La prezo de germana karbo devas esti plialtigita ĝis 40%.

Kunveno de socialistoj (Liberzec). En „koloseum“ okazis hieraŭ la kunveno de socialistoj, dum kiu parolis deputato al la germana peria parlamento D-ro Liebknecht. Kiam la parolanto priparoladis la aŭstrajn aferojn, la polickomisario interrompis lian paroladon.

— El Germanujo.

Liberigo de kapitano Kostjewicz. (Lejpeigo.) Kapitano Kostjewicz estis hieraŭ posttagmeze liberigita je kaŭcio kaj li forveturis al Berlino.

Post la mineja katastrofo. (Bochum). Hodiaŭ okazas la entombigo de oferoj de mineja katastrofo en minejo „Lothringen“. La ĉerkojn oni enmetas en du komunajn tombejojn. La imperiestron Wilhelm II anstataŭas dum entombigo la prusa princo Henriko.

Inter 130 oferoj de katastrofo la plimulto konsistas el Poloj!

La mondonacoj por familioj de mortigintaj atingis jam la sumon de 85.000 markoj.

Fervoja katastrofo (Bohum). Hierau vespere la vagono de urba fervojo elreliĝis kaj disrompiĝis. 3. personoj mortis, 7 grave, 10 malgrave estas vunditaj. La vagonaro estis troplenigita de revenantaj partoprenantoj en la entombigo de oferoj de katastrofo en Gerthe.

— El Hungarujo.

Rekrutigo en Hungarujo. Hierau komenciĝis la rekrutigo. Por la unua tago oni invitis nur 50 junulojn. Unu en ili subite frenezigis.

— El Anglujo.

Projektita atenco. (Londono). Oni sciigas el Peterburgo, ke princo Kastura forveturis neatendate pro tiu kaŭzo, ke oni malkaŝis la planon de atenco je li. Ĝi-tiu atenco devis esti la revenigo pro la mortkondamno de japanaj socialistoj.

— El Ameriko.

Sep mortpunoj. (Nov-Jorko.) En ĉitica malliberejo oni mortpunis ses Italojn kaj unu negron kondamnita je mortpuno pro mortigoj.

— El Rumanujo.

Forbrulo de petrolo minejo. (Bukaresto) En Mareno fariĝis hieraŭ en petrolo minejo granda brulo. Dum la helpdonado pereis 5. laboristoj.


Socialistoj! Jaude je 9-a mat. socialista kunveno ĉe Park Krakovski. Alvenu ĉiuj!

Lastaj sciigoj.

Kongresa ekskurso al salminejoj en Vjeliĉka okazis hodiaŭ je 12:40 tgm. per speciala vagonaro ornamita per verdaj standardoj. En la stacidomo en Vjeliĉka akceptis la ekskurson tre multnombraj ticaj loĝan-

toj. Paroladis urbestro Aywais. Salmineja orkestro ludis »La Esperon«. Impreso grandioza.

Krakova Tramo.



Anoncoj.

JAM APERIS UNUTAGAĴO

„Politika Malliberulo“

Priskribanta la vivkondiĉojn de politikaj malliberuloj en Rusujo.

Aĉetebla en librejo FR. EBERT
Krakovo str. Floryańska 35.

PREZO

KR. 0-60. SM. 0-25.

I. kaj r. patento Nr. 41589.

Mirinda eltrovo por suferantaj je la hernio
Nov-eltrovita saniga

Hernia zoneto

apud kiu konsistante el du partoj peloto ne surprenas hernian malfermaĵon, sekve ne elprenas inteston internen, kio povus kaŭzi diversajn intestajn suferojn, kiel okazadis ĉe la ĝisnunaj zonetoj. Ĝi kaŭzas bonan situacion de l'intestoj en la ventra kavoj. Eĉ por la plej ekstrema sufero ĝi estas tre facileza, sen risorto aŭ metalo ĝi estas portata sen doloro kaj ĝi subtenas radikale. Oni sendas klarigon post ricevo de poŝtmarko; elsendo senprokrasta.

M. I. Kantorowicz,

Podgórze strato de Józefińska 6.


Filioj: Varsovioj, Sosnowice, Vieno.

ĈEFTENEJO DE VESTAĴOJ
MAISON DE PARIS

G. SPRUNG

Kraków, Grodzka 30.





KONGRESA BULTENO

aldono al »ILUSTROWANY KURJER CODZIENNY« al n. 185.

Redakcio, Administracio kaj Ekspedicio
Kraków, str. Karmelicka, l. 16.
Telefono 1198.

Ĝefredaktoro kaj eldonisto *Maryan
Dąbrowski.*

Prezo de Nro:

10 helenj.

La „Kongresa Bulteno“ eliras ĉiutage dum
la kongresaj tagoj je la 6a horo vespere.

La redaktanta Komitato:
L. Kronenberg, E. Pfeffer, A. Czubyński

Nr. 4.

KRAKOVO, JHAUDE LA 15 DE AUGUSTO 1912.

Nr. 4.



Supre ni reproduktas la portreton de la multe meritata prezidanto de la Loka organiza komitato, universitata profesoro Dro Odo Bujwid. Tui ĉi fama bakterio-
logo, al kiu la scienco dankas jam kelkajn gravajn malkovrojn, varmege ekklopodis pri nia afero kaj estante mem fervora Esperantisto li multe helpis, por ke la Jubilea kongreso estu kronita per brila sukceso.

Parolado de Leo Belmont dum la Jubilea Festvespero.

Frenezuloj! — kial tia ofendo?

Ĝi ne estas ofendo!

Ĝi estas karakterizo, eltirita el studado de la gazetaro

Samideanoj! ĉu Vi ne legis milfoje en viaj landaj gazetoj, ke lingvo artefarita estas neebleco — ke nia majstro trompis nin — ke en Esperanto oni ne povas sentikaj pensi — ke ni ne havas en nia lingvo sufiĉe da vortoj — ke ni ne parolas, sed versaĵne... bojas, kiel hundoj, aŭ miaŭas, kiel katoj!

„Esperanto!“ — la sprituloj tutmondaj sur lito de l' morto ankoraŭ ridas, aŭdinte tiun-ĉi ridan nomon: „Esperanto!“

Mi do fine kredis al tiuj saĝuloj — al ĵurnalistoj, kiuj scias ĉion pri Esperanto, okupiginte je ĝi nur unu minuton.

Mi scias nun: lingvo artefarita estas revo nefarebla: kaj mi mem frenezulo estas, dum mi parolas esperante, ĉar neniu povas min kompreni.

Kiam iu parolas kun mi esperante, li ne parolas — ĝi estas mia orela halucino!

Ve! danĝera frenezeco bruligis mian cerbon... mi havas halucinojn de vidado kaj de aŭdado.

La oka kongreso! ĝi estas nur mia ŝajno. Ne flirtas tute la verdaj standardoj en bela Krakovo!

Ne flirtas ĉarmaj esperantistinoj. Nia hindo estas preparita en laboratorio de D-ro Bujwid. Tridek nacioj ne aplaŭdis al nia kara majstro. Ĉio estis nur ŝajno. Mi nur revas malsaĝan revon.

Kaj vi ĉiuj revas kun mi — mi ne estas tute en Oka. Ni sidas vermitaj en domo de frenezuloj. Nia malsano nomiĝas: „Lingvo Esperanto“. Kaj niajn korojn mordas malbela insekto, kiu nomiĝas: „Frenezeco de popoloj!“

Nu!... per Dio! estu do tiel!

Mi estas feliĉa, ke mi frenezigis... kaj feliĉa mi estas, ke mi havas tiom da noblaj kameradoj en mia frenezeco.

Ni estas frenezaj kaj ni havas rajton ridi... je niaj saĝaj kuracistoj anti-esperantaj!

* * *

Ne!... ĝi ne estas vero...

Nia ŝajna frenezeco estas noblega malsano de ĉiuj idealistoj, kiuj kreas novan Vivon por la mondo kaj devas esti antaŭe krucigitaj sur kruco de mokado — por ke la mondo praktika havu poste el nia oferanta sango fortikantan vinon kal el nia entuziasma cerbo ĉiutagan panon...

Kaj nia majstro — sola homo en mondo, kiu hodiaŭ havas varmege amantojn inter ĉiuj popoloj de tero — estas homo verege geniala!

Napoleon' ja diris:

„genio estas nur la scipovo fari diferencon inter ebla kaj neebla.“

Kaj nia majstro tion ĉi sciis bone.

Antaŭ multaj jaroj, kiam li, ankoraŭ juna studento, revis pri la lingvo tutmonda — venadis spiritoj de jarcentoj kaj diradis al li:

„Gesu! La enigmo estas nesolvebla!“

Sed li ne kredis al ili.

Kaj venadis al li veraj frenezuloj, parolante:

„Ne turmentu vin por solvi enigmon nesolveblan. Rigardu nin, kiuj provis samon kaj mortis en sanulejoj de frenezaj. Gesu. Via vojo estas vojo de malespero!“

Sed li respondis:

— Mi tamen estas Esperanto!

Kaj multfoje post tagoj oferaj kaj laboraj en noktoj ŝajnis al li, ke ŝtonoj de neniam finita turo Babelo kolere volas fali sur lian kapon kaj troti lin, Kuragulon kontraŭdian.

Sed li ne timis!

Kaj faris — sian verkon!

* * *

Mokemuloj diras:

— Li kreis jargonon, strangan miksaĵon. Per sia kaprizo enlasis unuajn vortojn kaj forpulis aliajn! Ĉiu povis fari samon, sed ne volis.

Jes! nur sola volis — li, ĉar li havis en si fajron Dian de la volo — genialan fulmon, kiu lumigas nokton de vivo.

Kaj li ordonis inter lingvoj popoloj ne hazarde sed saĝe kaj juste...

Auskultu!

Jen kiam la majstro konstruis

Per granda labora ofer'

La domon de lingvo tutmonda

Por ĉiuj popoloj de ter' —

La multaj fantomoj venadis,

Alportis oferojn en man'

Kaj diris: vi devas ĝin preni,

Por ke plenumigu la plan'.

Alvenis jen ĉarma Francino,

Pri kiu ne scias poet' —

Ho! kie komencas sin buŝo

Kaj kie finiĝas ridet'.

Ŝi estis do kvazaŭ spritfonto

Kaj kvazaŭ Musseta poem'...

Okuloj koketaj rigardis

Kaj majstro ruĝiĝis ja mem'...

Ŝi diris: Enlasu min majstro'.

Por mi estas ĉi tiu dom' —

Mi estas amata filino

De urbo plej sankta de Rom'...

Mi havas do rajtojn heredajn

Per mia antikva la av'...

Duonon de mondo ĝi reĝis

Per leĝo kaj ankaŭ per glav'...

Duonon de mondo hodiaŭ

Ekreĝas la mia ridet' —

Kaj franca spirito nun estas

De monda libero profet'...

La Majstro ĉapelon deprenis

Kaj diris: Aminda Francin'

Mi amas ja forton de ĉarmo,

Neniam forgesus mi vin!...

Li donis ordonon — rigardu!

De nun ĝis eterna la temp

En lando de la Esperanto!

Ekreĝas la franca printemp'...

Bedaŭrinde — mi ne havas tempon por al vi rakonti, kiel justa Majstro prenis de Italaj finiĝon: o — por doni al „Esperanto“ italan belkanton — kaj de Hispanoj li prenis finiĝon as — pro tio ni amas kun temperamento Hispana en Esperantojo — kaj de Germanoj prenis „Ŝajnon“, ĉar germana filosofo Kant' geniale pruvis, ke mondo estas nur ŝajno...

Mi ne havas tempon por rakonti, kiel forte batalanta pro rajtoj Anglino ordonis

UNIVERSALA ESPERANTIA
BIBLIOTEKO

al li, por ke angla ŝipo reĝu en Esperantujo — kaj majstro estis al ŝi obeema.

Mi ne rakontos al vi, kiel saĝe prenis Majstro simplan sintakson de slavaj popoloj... Al mi mankas la tempo — ĉar koncerto estas granda...

Sur pola tero mi ne povas silenti nur pri unu — kaj mi rajtigita estas aldoni nur unu, kio koncernas Polinm.

Kajfine alvenis Poline
Kun larmoj en blua okul'
Kaj diris: ĉu Vi min forgesis?
Pro kio respondu, saĝul'.
Servado al landoj potencaj
Ne estas ordono al Vi...
Polujo ne estas perdita
Dum vivas ankoraŭ ja ni!...
Kaj majstro respondis: Polino
Neniam forgesus mi Vin...
Mi estas ja filo de tero
De kiu Vi estas flin'.
Aŭskultu! plej granda en mondo
Mistera de l' viv' logaritm'
Ho! estas latado de l' koro
La sanga akcento — la ritm'.
Sur la antaŭlasta silabo
La pola stariĝas akcent'
Ĝi estu do en Esperanto!...
En ritmo vivadas la sent...
Kaj reĝas akcent, poezion,
Ritm' estas la gaj' kaj dolor'...
Pro tio en Lingv' Esperanto
Batados... la pola kor'!
Kaj dum Esperanto travivos —
En ĝia belsonharmonij'
Travivos la pola akcento
La ritmo de Pol-poezi'!...

Tiel volis li, nia majstro!...
Pardonu — —

Nia majstro malpermesis al ni de nun nomigi Lin: majstro.

Li faras nin de „oka“ liberaj homoj. Li permezas al ni de nun diri:

„Zamenhof, diras frenezajon“...
Bonege!

Nun mi, kiel homo libera, parolas al Vi:
„Zamenhof, diras frenezajon, kiam ni volas malpermesi al mi nomi lin „Majstro!“

Mi ĝin argumentos.

Unue: mi estis ĉiam homo libera — tamen ĉiam nomis mi lin laŭvole: majstro.

Due: mi estas unu de unuaj Esperantistoj. Mi, kiel infano aĉ mamoo esperante, balbutis: Majstro! Kaj nun, kiam mi grizigis en Esperantujo oni konsilas al mi dejeti melbelan kutimon. Ne! mi denove infanigis post dudek kvin jaroj — kaj en tagoj de maljuneco mi ne povas deteni min kaj paroli alie, ekzemple: „Malmajstro“.

Kaj mia obstino estas rajtigita.

Tamen majstro ĉiam restas majstro. Michel Angelo restis por ĉiuj jarcentoj — la majstro kaj tamen skulptarto iris kaj iras antaŭen.

Dio, kiu per sia vorto kreis mondaron, neniam ricevos dimision — neniam estos: eks-Dio!

Kaj la majstro, kiu per sia geniala volo kreis mondon Esperantan — restos por ĉiuj posteuloj, kiel li estas hodiaŭ por ni: Majstro!

Tiakaŭze mi kantas himnon en koro — por nia majstro!

Mia himno sonas:

* * *

En oka kongreso.

Por majstro nia,

Por hom' genia,

Por bonfaristo de l' homar',

Por lia verko, Esperant', —

Nun sonas ĉie ama kant',

Konstruas sin l' „astim'-altar'!...“

Por hom' modesta
ĉi tago festa

Kronetojnlektas el florar'....

En ravo krietuta mond',

Esperantista rond':

Vivu amik de l' homar'!...

Dissendis senjn tra aer'

Cambridge, Cnev', Boulogne sur Mer,

Dresdeno, arcelon'.

Antverpo, asington' —

Kaj kreskas in en ĉin land'

La laŭra arbor Esperant', —

Por majstri estas kron'!

Por majsto n

Por hom' gena,

Eksonas je kaj mia rim'...

Kaj flugas eldankema kor'

Tra esperantmondo for

La kant' de l' amo kaj estim'!

Modesta estas la kronet',

Sed ĝin alponis granda kred'

Por senmortece glori altar',

Por majstro ia,

Por hom' gena,

Por bonfarito de l' homar';

* * *

El pola ovo lingvo iris,

Pro tio ĉiam ni deziris,

Ke ĝi festem ĉe la ov',

Efektivigis beh rev' :

Kaj plenumiĝi nobla dev':

Festenas nin ni en Krakov'.

Poetoj polaj bonon volis

Profete ĉiam priparolis,

Ke amo estas Dia blov'...

Kaj por popoloj granda cel'...

Respondas ĉio el Vavel';

Vivu le Majstro, Zamenhof

Leo Belmont.

AL POLAJ GESAMIDEANOJ!

Malrapide sed konstante kreskas nia kara afero. Polaj, ĉiuj antaŭaj malhelpoj, finiĝis antaŭaj mokoĵoj, Esperanto komencis ĉe ni esti serioze pritraktata kaj serioze akceptata. Alvenis la tempo de l' persista ĉiufanka laboro. Propagandu, propagandu, ankoraŭ unufoje propagandu! Propagandu ĉiam kaj ĉie, propagandu ĝis la venka horo, ĝis nia tuta, dudekmiliono nacio, komprenos ĝuste la valoron de Esperanto por si kaj por la mondo ĝis nia nacio opinios Esperanton sia propra afero. De kelka tempo aperas pollingve, „Biblioteko por propagando de Esperanto en Polujo“. Ĝis nun ĝi eldonis 5 broŝurojn, kiuj ni estas pro tio fieraj kaj esperoplenaj — bonege helpis la propagandon en nia tando.

Polaj Samideanoj! Al Vi ni turnas nin kun la peto, al Vi, pacaj kunbatalantoj kaj kunlaborantoj, ke Vi helpu nin en nia malfacila laboro. Helpu ĝin, helpu Vian, Vian propagandan bibliotekon — morale — rekomendante ĝin al la ankoraŭ skeptikuloj — materiale — aĉetante kaj aĉetigante la ĝis nun aperintajn verketojn.

Obstine antaŭen por nia kara lingvo!

A. Czubyński, L. Kronenberg, E. Pfeffer.
redaktoro de „Biblioteko por propagando de l' Esperanto en Polujo.“

Esperanto kaj la armeo.

Generalo de Lacroix. Mi observas kun intereso la progresadon de via afero. La utileco ed Esperanto estas nedubebla, miaj varmegaj bondeziroj akompanas la disvolviĝon de tiu grava helpa rimedo.

Generalo Garnier de Gurete: Mi ricevis viajn broŝurojn pri Esperanto kaj mi transendas al ĉiuj laborantoj pri la afero de komuna komprenigado de la popoloj miajn korajn salutojn, ke ili povu rebo-

nigi la difektojn, kiujn kaŭzis la Babeltura konfuzo, donante al la tuta mondo la eblon de reciproka interkomprenigo. Vi meritas esti subtenataj kaj mi deziras al Vi, ke en ĉiu lernejo en la mondo oni instruadu pri Esperanto, ĉar al la junularo apartenas la estonteco kaj jam al nia juna generacio devos servi la ŝi por internacia komprenigado.

Kolonelo d' Arman de Passy la franca attaché de Generala Stabo de l' Armeo ĉe la Ministerio de Milito. Mi konsideras Esperanton pro ĝia ekstrema simpleco kaj gramatika facileco, kiel lingvon universalan *par excellence*. Mi inkliligas miajn tri filojn, ke ili lernu tiun lingvon, ĉar mi estas konvinkita, ke la ekposedo de la lingvo Esperanto povas doni netakseblajn servojn en ĉiuj kampoj de la homa scio kaj laboro.

Kolonelo Dronot, la komandanto de 104 bataliono de l' infanterio en Parizo. Se mi prokrastis la respondon, do nur tial, ĉar mi volis mem sperti la malhelpojn, kiuj al ni kaŭzas la lernado de Esperanto.

Mi provis kaj mi devas konfesi, ke mi facile konstruadis per helpo de la gramatiko kaj la vortaro la plej ordinarajn frazojn por la ĉiutaga vivo kaj mi venis al la konkludo, ke Esperanton oni povas ellerni multe pli rapide, ol ĉiun alian lingvon vivantan aŭ malvivan. Estas necese, ke la ŝtatoj, kunvokinte kongreson akceptu tiun lingvon kaj metu ĝin en la programojn de siaj lernejoj.

La komandanto Pénelon, attaché de la Militista Kabineto ĉe la Prezidanto de La Respubliko. Mi havas tian saman opinion, kiel mia kolego, ke la junaj homoj povas ĉiam kun granda profito studi Esperanton.

Tria tago de la Kongreso.

Krakovo, la 14. de Aŭgusto.

La kontoroj de la Kongreso estis hieraŭ malfermitaj ĝis la 12. tagmeze; poste pro la ekskurso de la kongresanoj al Wieliczka (Wielicka) oni fermis ilin ĝis la 6^{1/2} vespere.

La movado en la kontoroj estis sufiĉe vigla — en la sekretariejo oni eldonis ankoraŭ 37 novajn kongreskartojn.

La kongresa banko havis antaŭtagmeze en la spezado preskaŭ ekskluzive akreditivojn kaj ĉekojn, plejparte el anglaj bankoj, ankaŭ el italaj kaj hispanaj. En la poŝtan kontoron de la 9. ĝis la 12 tagmeze oni donis 1042 leterojn kaj poŝtkartojn.

La kongresaj poŝtkartoj kun la krakovaj vidaĵoj, eldonitaj de la Komitato kun polaj kaj esperantaj surskriboj, estas tre volonte aĉetataj de la Kongresanoj. Da tiuj kartoj oni disvendis de sabato cirkaŭ 27.000.

Hodiaŭ la kongresaj kontoroj estis malfermitaj la tutan tagon, la ekspozicio de lingvo internacia de la 9. ĝis 12 tagmeze kaj de la 3. ĝis 6. vespere.

La ekskurso al Zakopane la 18. de l' kuranta monato je la 7. matene. Sinjoro Andreo Chramiec kaj lia edzino dissendis al la kongresanoj invitojn al raŭto, kiun ili eldonas por la honoro de la kongreso dimanĉe la 18. je la 8. vespere.

Studenta sekcio interkonsiligis hieraŭ je la 10. matene ĉe la partopreno de 27 studentoj el diversaj universitatoj de Anglujo, Francujo, Ruslando, Serbujo, Germanujo k. t. p. La diskuton inaŭguris S-o Joza Mares en la nomo de Universala Studenta Asocio, post kio oni elektis kiel prezidanton Sinjoron Władysław Giercuszkiewicz (Lvovo), kiel vicprezidanton S-on Mares, kiel sekretarion S-on Chrestanof (Bulgarujo). Sekvis referatoj de Jan Mędrkiewicz (Grac) sub la titolo: La praktikaj bezonoj de ĝenerala studenta organizaĵo kaj de Loth (Lozanna) sub titolo:

Pri Universala studenta organizo "Daŭrigo de la laboroj jaŭde, la 15. je la 2. posttaŭze.

Varea prezento en la Arĥitektura Ekspozicio Fine de l'hieraŭa tago okazis komunanango de la kongresanoj en la teatro "Arĥitektura Ekspozicio. Dume oni arais varietean prezenton.

Kio okaz hodiaŭ? Je la 9. matene komenci plena kunsido de U. E. A.; samtempantaŭtagmeze laboris la sekcioj de bankcistoj, vegetaranoj, verkistoj, publikoficistoj, socialistoj, pacifistoj kaj la Ruĝa lupo.

Je la 2 komencos labori la sekcioj: kuracistoj, scienculoj, komercistoj, poŝtoficistoj, justoj kaj ĵurnalistoj. Je la 3^{1/2} en la ĉambrego de Malnova Teatro dua plena kunsido de la kongreso. Vespere je la 8. okazos en la Urba teatro la prezento de „Mazepa“; por tiu ĉi prezento la Vienaj kaj francaj ĵurnaloj delegis jam siajn raportantojn. „L'Illustration“ turnis sin al la komitato kun la peto liveri al ĝi foto-grafajojn de ĉiu prezentado.

Saluto al Kraków.

La verkinto de suba versaĵo, naskita en Krakow, sed loĝanta konstante en Antverpeno, petis nin pri ĝia enpresigo in en la „Kongresa Bulteno.“ Ni faras tion kun vera plezuro, rimarkigante la legantojn pri ĝia simpleco.

Kraków, ĉarma, pola loko elektata,
Por nia hodiaŭa, frata festeno,
O! treege mi dankas vin, kortuŝata,
Por via belega solena bonveno.

En plena, nobla, potenca majesteco
Sin eklevas, la fiera Vavelo
Atestanto! de iama Pola grandeco
Kun siaj turoj, kaj belega Kastelo.

La kripto de la Sankta Ĝefpreĝejo
Kie, pace dormas Kaźmierz la granda
Flanke la, vistulfluo, en kies ondejo
Dronis gloriinde, la heroino Vanda.

Ne forgesu, la legendon de la drako
Kiun Krakus la brava heroo mortigas
Kaj rigardadu, la monteton Kościuszko
Kies kuraĝecon ĝi remomerigas.

En la Universitato fama, Jagiella
Instruis la granda, saĝa astronomo
Ke ter turniĝas ĉirkau la sun' hela
Mikolaj Kopernikus estas lia nomo

La oka internacia kongreso
En niaj historiaj muroj okazas
Certe, vere granda estas la sukceso
Senfinan ĝojon ĝi al ni kaŭzas

El la libera, malproksima Belgujo
Plej varmegajn salutojn, mi al vi portas
Kvankam mia dua amata patrujo
Mi, mian karan Polan ankoraŭ pli ŝatas

Kun fiereco, en nia Pola urbo,
Plantas ni ĝoje Esperantan standardon
Kaj radikos firme „potenĉala arbo
Ĝiam portos triumfe ĝi, freŝan verdon.

Unu celo kara, pola frato mia
Nedisigebla nin, unigas kune
La logika, bela lingvo, internacia
Netuŝebla rokfirme, staras ĝi nuue.

Maks. Horowitz.

Ĉiuj vegeteranaĵ gesamideanoj devas manĝi en la

**UNIKA VEGETARANA
MANGĜEJO**

„PRZYRODA“

strato Krzyża 7 Krakovo.

LOKA KRONIKO.

La parolo de nia Majstro, farita dum la Oka kaj multaj interesaj artikoloj pri krakovaj vidindaĵoj salminejoj Wieliczka k. c. jam aperis en lasta N de Pola Esperantisto. Ĝi kaj la pola-esperanta slosilo (eldono de Günther) estas senpage riceveblaj en Akceptejo.

Ruĝa standardo, eldonita private de unu samideano, estis en akceptejo disdonita inter kongresanoj sen permeso de la eldoninto. Malgranda nombro da savitaj ekzeimpleroj estos morgaŭ vendata dum la popola socialista kunveno po 20 hel. ekzemplero.

Ĉiujn personajn, dezirantajn de mi informojn pri ia ajn afero mi petas viziti ĵurnalistan ĉambregon sur la 1-a etaĝo de Komerca Akademio dekstren, jaŭde je 3a h. postt.

L. Kronenberg.

Servado de T. E. K. A. dum la kongreso. Unu el niaj Samideanoj, studento Sro Klotz el Lodz, veninte kongreson malsaniĝis. Tuj estis sciigita pri tio nia konata samideano Dro Robin kiu kune kun Dro tuj konsentis helpi al malsaniĝinto. Esperantista kuracado estis tiel bona, ke jam hieraŭ nia samideno tute saniĝis. Li tre dankas suprenomitajn samideanojn pro ilia helpo.

III. a Kongreso de U. E. A. La publika malferma kunsido de nia vigla Asocio okazis lundon matene je la 10-a en ĉambrego de la Malnova Teatro antaŭ pluraj centoj da plej fervoraj Esperantianoj.

S-ro H. B. Mudie, tiel simpatia laboremulo prezidis. En klara parolado, kelkfoje per spritaj frazoj li diris la jam efektivigitan seriozan laboron kaj montris la taskon por la estonto. U. E. A. prudente iras rektan vojon inter marĉoj, sed ĝi ne falos en ilian koton. La kara prezidanto havis grandan sukceson.

Poste S-ro Hodler, neniam laca ĉiam agema, faris ankaŭ paroladon altspiritan. Kvankam tre idealista, la Direktoro de la Centra Oficejo de U. E. A. estas praktikema antaŭ ĉio. Laŭ li, kaj prave, Esperantistoj devus sekvi sciencan metodon kaj laŭ faktaj eksperimentoj detiri teoriojn, sed neniam ni devus, kiel ofte okazis, peni realigi nematurajn ideojn.

Ĉiuj ĝojos, se ili havos plezuron legi tiujn ambau paroladojn en la ĵurnalo Esperanto. Lacigita S-ro Hodler ne povis mem legi sian raporton pri morala stato de Esperantio. Ĝin legis S-roj Mudie kaj Fleck Ni rimarku, ke ĝi senpartie montris ne nur la gajnojn sed ankaŭ la tre malgravajn perdojn en la nombro de diversaj Esperantianoj.

Sekve okazis amika inteŝanĝo de ideoj inter la ĉeestantoj.

Proksima kunveno okazos merkredon matene je la 9-a horo ĉe la Komerca Akademio en ĉambro speciale rezervita por UEA. Oni bonvolu antaŭe aĉeti la Kongreskarton de UEA.

Fakaj Kunsidoj. Por ke la protokoloj de la fakaj Kunsidoj estu enpresataj en la Oficiala protokolaro de la Kongreso, oni devas ilin sendi al Sro Gabriel Chavet, sekretario de la Kongreso (Paris, 51 rue de Clichy), aŭ ilin doni al li en Krakovo.

2-a Kunveno de ĝeinstruistoj okazos vendredon je la dua kaj duono Tagordo 1-e Protokolo de la 1-a kunveno.

2-e Klarigoj pri internacia asocio de instruistoj kaj pedagogia revuo.

3-e Kolekto da abonoj.

4-e Decidoj pri la raporto de S. Jakobs.

5-e Diversaj deziresprimoj.

Ĉiuj ĝeinstruistoj devas nepre ĉeesti tiun gravan kunvenon!

La Kunsido de T. E. K. A. anoj okazis Merkredon je la 2 h. en la Salono de „Kuracista Societo“, Radziwiłowska, 4, D-ro Fiŝer faris sian publikan paroladon (por ĉiuj Kongresanoj) „Duonforĝita angulo de Kaŭkazo (Svanetio). Krom tio en sama loko kaj tempo okazos sekvantaj proladoj popularaj a) D-ro Rafael de San Millan — „Gimnasiko kaj atletaj Sportoj“ kaj b) D-ro E. Sós — „Pri la historio de dentkuracado kaj tekniko de artaj dentoj.“ „Lunde je la 6-a vespero en la luksa Salono de „Kurac. Societo“ okazis publikaj paroladoj aranĝitaj de T. S. K. A. Unue la D-ro Gelibter legis pri la Sendanĝereco de flegado de infektaj malsanuloj por flegistoj kaj poste prof. Odo Bujwid montris sur la lumbildekrano kelkajn mikroskopajn preparatojn, kiuj konatigis la ĉeestintojn proksimume 50 personojn kun pli gravaj bakterioj kaj demonstraĵis belegan aparaton por lumbildoj.“

Al ĉiuj gesamideanoj, vizitontaj ĉefurbon de Bohemujo Praha ni rekomendas varme 2-an eldonon de ilustrita gvidfolio

tra Praha, eldonita de la „Bohema Landa Ligo por akcelo de la turisma movado“.

Ĉiuj samideanoj traveturantaj Plzenon bonvolu sciigi per poŝtkarto sian alvenon en Plzen al sro. B. Tittl. Plzen V. Radinská ul. N. 10 Bohemujo — Aŭstrio.

Al ĉiuj gekongresanoj! Jaŭdon matene okazos manovroj de Ruĝa-kruco, ĉeestataj de la tuta Kongreso. La organiza Komitato bezonas du specojn de partoprenantoj:

1-e Flegistinoj;

2-e Vunditoj (nur virojn oni enlasos).

Ĉiuj sinofereculoj, ĉu flegistinoj, ĉu vunditoj, bonvolu konigi siajn nomon, adreson, kaj lingvanecon, la S-ro René-Charles Pichon, ĉu en lia persona loĝejo („Pension de Famille“, Straszewskiego 27), ĉu per interkongresana poŝto. Ili ankaŭ, se eble, ĉeestu preparan kunsidon de la manovroj en komerca Akademio, enirejo de „Fakaj Kunsidoj“, tria etaĝo, ĉambro 18.

René Charles Pichon,
Kongresano 12).

Subkongreso de studentoj komencis siajn kunsidojn hodiaŭ je 9 matene. Post malferma parolado de kol. Mareš, oni elektis estraron de subkongreso:

Wl. Giebuszkiewicz el Lwów prezidanto.

J. Mareš el Luhačovice viceprezidanto.

Krestanoff el Sofia I. Sekretario.

H. Perl el Königsberg II. Sekretario.

Sekvis paroladoj de delegitoj reprezentantaj diversajn societojn studentajn kaj poste prelegoj pri organizaĵo de la studentaro. Unuan prelegon ĵus finis kol. J. Mędrkiewicz: „Pri Praktikaj bezonoj de esperantista studentaro“.

Sekvanta kunsido jaŭde je 2-a horo posttagmeze en Komerca Akademio III.

Neniu kongresanto kiu vizitos la ekspozicion, forgesu trarigardi ĉarmajn vitrajn esperantaĵojn, kiujn elmetas firmo Jaroslav Laŭka el Kamenice nad Lipon (Bohemujo). Ĉiu kongresano havas plej bonan okazon aĉeti tie praktikajn, belaspektajn kaj malmultekostajn eĉ luksajn rememoroobjektojn por si kaj siaj gekonatuloj. Atentu la artikolon rekomendan aperintan en kongresa numero de Pola Esperantisto.

Poŝtaj aranĝoj dumkongresaj renkontas veran laŭdon de ĉiuj samideanoj. Tute prave! Dank' al servemo de Soj Zajaczkowski kaj Inicki, superaj poŝtaj oficistoj, la poŝto kongresa funkciadas bonege. Cititaj Soj meritas nian plenan dankon.

Ricevitaj eldonadoj Praha. Ilustrita gvidlibro por turistoj. Eldonita de Ĉasopis Českých esperantistu. J. 1908. Prezo 60 hel.

La supre citita gvidlibro estas vera modelo, kiel oni devas prizorgi similajn eldonadojn. Ĝi konsistas el kelkaj ĉapitroj, priskribantaj la historion, nunan statistikon kaj vizitadon de la urbo. La eldonado estas provizita riĉe per fotografajoj, kiuj multe plialtigas la valoron de la gvidlibro. Ni povas ĝin tial juste rekomendi al ĉiuj turistoj. Ankaŭ la vidaĵkartoj el Praha kun klarigaj notoj en Esperanto meritas plej bonan recenzon. Ni gratulas varme al «Biblioteko de Ĉasopis Českých esperantistu».

»Anonimuloj« bonvolos sciigi nin pri sial veraj nomoj. Nur tiakondiĉe ni povos presigi la artikolon.

Esperanta Genta Semajno — Gand, Belgujo, 1913. Internacia ekspozicio.

Prelego pri la vivasekuroj. Pri tiu temo parolados vendredon antaŭtagmeze je la 11¹/₂a. sinjovo Paul Fellgetren, al la Krakovo kongreso komisiita de la vivasekura kompanio Frideriko Vilhelmo en Berlino (Germ), kiu la unua el ĉiuj asekuraj kompanioj eldonis esperantajn prospektojn kaj cirkulerojn, kaj aperigos iom post iom ĉiujn bezonatajn kaj aliajn formularojn en Esperanta teksto, por ebligi per tio disvastigon en la tuta mondo, kaj por samtempe pruvi, ke ĝi konsciigis la gravan utilecon de internaciaj, speciale asekuraj aferoj. Ĉiu estas invitita!

Antoni Hawelka.

Krom Wavel kaj multaj rimarkindaj antikvaĵoj, posedas Krakovo ankoraŭ ion, kio meritas pli grandan atenton, fremdan por aliaj kontinentaj urboj.

Tiu ĉi specialaĵo estas multaj en nia urbo lokaloj matenmanĝaj, aranĝitaj laŭ tute originala maniero. Tamen inter tiu ĉi amaso da Krakovaj „drinketejoj“, kiel nomas ilin la Krakovanoj, estas plej fama kaj konata la plej malnova de Antoni Hawelka.

En tuta Krakovo kaj en tuta Polujo vere ne estas eĉ unu homo, al kiu tiu ĉi nomo ne estus konata. Konas tiun ĉi nomon bone ankaŭ la eksterlando.

La kreinto kaj estinta posedanto de tiu ĉi firmo ne vivas jam de longe; tamen la firmo, kvankam per alia homo estrata, posedas la antaŭan gloron. Simile kiel Polo ne povas imagi al si Krakovon sen Vavel, kaj ĝia antikva karaktero, tiel ankaŭ li ne povas imagi al si Krakovon sen elpendaĵo kun surskribo „Antoni Hawelka“. Krakovanoj estas ankaŭ fieraj je tiu ĉi restoracia firmo.

Ĝi povas esti bona modelo por unuarangaj firmoj eksterlandaj modelo eble ne imitebla koncerne scion de provizado sin per ĉiaj komercaĵoj el la regiono de l' gastronomio. Hawelka estas vera eldorado por amatoroj de bonaj manĝaĵoj!

La nuna posedanto de la firmo, So Fr. Maharski, gloras sin per la titolo de „liveranto de imperiestra kortego aŭstria kaj de greka reĝo. Krom tio ankaŭ de Vatikano. Kaj ĝi ne estas nur titolo. La firmo ricevas tre ofte de cititaj kortegoj mendojn pri manĝaj artikoloj, kiujn ne povas kelkfoje liveri ĉefurbaj firmoj.

Hawelka akceptas en sia modesta loko ĉiun rangulon vizitantan Krakovon. La plej eminentaj homoj opinias la viziton de Hawelka kiel sian devon, ne malpli gravan ol viziton de Krakovaj konstruaĵoj. Ne timigas ilin malvasteco aŭ manko de ordo. En tiu ĉi direkto la firmo iom lamas, sed oni devas atenti, ke la restado de la vendejo en hodiaŭa ejo estas nur duma. La nuna domo apartenas al la plej malnovaj en la urbo, do nenio mirinda, ke ĝi ne povas plene taŭgi por simila firmo.

Sed la firmo eĉetis por si najbaran domogon, konatan kiel „Palac Spiski“. Tie, en vastaj, laŭ plej granda komforto aranĝitaj ĉambroj, troviĝas la vendejo, bufedo kaj la restoracio jam post kelkaj monatoj tiam malaperus tio, kio povus forimigi iun de tiel simpatia firmo. Bedaŭrinde tio ne povis okazi antaŭ la Oka Kongreso esperantista, kio vere dolorigas S-on Maharski. Oni devas do akcepti dume tion kio estas kaj kia ĝi estas. La esperantistoj estas eĉ Hawelka ĉiam plej gasteme akceptataj kaj la 4 laborantoj, posedantaj lerte nian lingvon ebligas ĝustan komprenigon. La kuirejo estas dum la kongreso provizita per multaj manĝaĵoj, inter kiuj preskaŭ ĉiu renkontos tie ĉi siajn „naciajn“ manĝaĵojn.

La firmo de Hawelka estu do por kongresanoj renkontejo la tiam, kiam niaj stomakoj postulas sanan kaj bongustan manĝaĵon.

Telegramoj el la Mondo.

El Rusujo.

Proceso pri ribeloj en la armeo. (Petersburg). El Taškent oni sciigas, ke tie komenciĝis proceso pri ribeloj en la tendaro de saperoj (pafistoj). La nombro da akuzitoj kalkuliĝas je 328 personoj. Ilin defendas ro ofiroj, estantaj en aktiva servo.

Atenco kontraŭ la caro? (Petersburg). Grandan sensacion elvokis tie ĉi la sci


de londonaj kaj berlinaj gazetoj, ke en Sebastopolo kaj Odeso oni arestis 16 maristojn kiuj intencis forrabi la caron kaj devigi lin al abdikacio, post kio la maristaro volis deklari Rnslandon respubliko. La ribelo de la ŝiparo estis jam delonge preparita. Dum la arestado venis al sanga batalo. Milita juĝistaro kondamnis 10 kompletulojn al la morto.

El Aŭstrio.

Pole-rutena interkonsento. (Vieno) En Ischl estis konferenco inter la ministro de financoj Biliński kaj la parlamenta deputato Wassilko pri la pole-rutena interkonsento.

Mortigo la policiston. (Vieno) Hodiaŭ nokte la policisto Sigismunto Sacher arestis pro ekscesado iun Rauscher-on. La arestito elprenis tranĉilon kaj vundis per ĝi la policiston, poste li ekiris al li la sabron kaj trapikis lin. La policisto mortis sur la loko.

Rauscher estas arestita.



KONGRESA BULTENO

aldono al »ILUSTROWANY KURYER CODZIENNY« al n. 186.

Redakcio, Administracio kaj Ekspedicio
Kraków, str. Karmelicka, l. 16.
Telefona 1198.
Ĝefredaktoro kaj eldonisto *Maryan Dąbrowski*.

Prezo de Nro:
10 heleroj.

La „Kongresa Bulteno“ eliras ĉiutage dum
la kongresaj tagoj je la 6a horo vespere.

La redaktanta Komitato:
L. Kronenberg, E. Pfeffer, A. Czubyński

Nr. 5.

KRAKOVO, SABATE LA 17. DE AUGUSTO 1912.

Nr. 5.



D-ro Szepean Mikolajski, redaktoro de
„Lvova Kuriero“, prezidanto de la Oka.

Al Triumfanto.

(Por D-ro Ludviko Zamenhof, en 25-jara
esperantista jubiler festo*).

Detruu muron! Sur Panatenejoj
Li prenis laŭron! Trans breĉ' triumfanto!
Nom' Via bruos en ĉiuj sanktejoj,
En ĉiuj verkoj kaj en ĉiu kanto,
Kaj venko via ne nur en Hellado
Sed ĉie famos, kiel Olimpjado...

Ho! heronikes! forta Via mano
Kaj mens' potenca, kiel Zeŭsaj tondroj,
Sur brusto Via brilas talismano,
Sur frunto falas de Atene ombroj...

Ne tiel sonas disko en la flugo,
Kitar' kaj fluto ne tiel lamentas,
Ne tiel ŝipo por mar' estas jugo
Kaj ond' riveron ne tiel fermentas,
Kiel vort' via potenca, impona
Kaj kiel sun' hela, kiel or' belsona...

Aŭskultu! Tio de Flimet' abeloj
Zumas, kaj el heroa temp' reson'
De l' rid' homera flugas al oreloj
Kaj fluas, kiel la trankvliga ton,
Kaj tie jen de Salamin' voĉ' diras,
Kaj tie tondr' el Termopilo iras...

Ĝin aŭskultante — la hellenodikoj
Sur kapo Via metas laŭrgirlandon,
Kaj ĉiuj Viaj adorant'-anikoj
Aklamas Vian nomon, Vian patrolandon,
Kaj kie de Atene lanco brilas ora,
Staros nun monumento al Vi plenhonora...

Heŭ! al Akropolo! heŭ! al Pritanejo!
Al Panteono! Iru la venkinto!
Al via urbo trans rompita oĵo!
Sur la plej alta akropola pinto!
Kaj aŭdu, fiera, kiel miriado
Flustros al Vi tie: „la tuta Hellado!“...

El pola lingvo tradukis
Aleksander Bolesław Brzostowski.

*) Estis iam moro en antikva Hellado,
ke la verkinton (hieronikes) sur Panatenejoj,
aklamitan de panhelenaj ĵugistoj (hellenodikoj)
oni triumfe enkondukis trans breĉo la muron
al lia hejma urbo. Sur tiu temo, talenta pola poeto
Bozydar apogis antaŭ kelkaj jaroj belan versajon sub
titolo: Al Triumfanto kaj dediĉis ĝin, dum jubilea
festo de Henriko Sienkiewicz, al tiu ĉi glora romanverkisto.
Jen, mi kuraĝas hodiaŭ traduki la saman poezion
kaj dediĉi ĝin al nia kara Majstro, kiel ankaŭ
vera triumfanto dum la 25-jara jubileo de naskiĝo
en Pollando de lia grandega verko.

**) Ĉi tie du versojn forstrekis rusa Cenzuro.

Zakopane.

En ĉarma monda rondvalo kuŝanta je
850—1000 m. super la marsupraĵo, ŝirmita
de unu flanko per ĉeno de ĉieltuŝantaj Tatroj,
de alia per monteto, nomata Gubałówka,
distendis sin, konservante karakteron de
granda vilaĝo Podhala, sufiĉe haose, la plej
granda kaj bela sanigejo kaj turista stacio —
Zakopane.

De post la tempo kiam D-ro Chałubiński
„makovris“ Zakopane, ĝi konstante disvolviĝas
allogante multenombrian armeon da gastoj,
serĉantaj la plibonigon de sia sano, aŭ turistoj.
En 1885 jaro ĝi estis aprobita oficiale kiel
sanigejo. Zakopane fariĝas ĉiujare pli forta
kunligilo inter ĉiuj partoj de Polujo, viva
monumento de nova ekzistado, nova fortikaĵo
de pola kulturo, subtenata per la brakoj de la
nuntempuloj.

Kiel mi diris, Zakopane estas antaŭ ĉio
sanigejo kun monta klimato, kiu taŭgas por
kuraci diversajn malsanojn: brustajn, nervajn
kaj aliajn; ĝi kunigas ĉiujare ĉirkaŭ dekkelke
miloj da kuracgastoj. Ĝi posedas krom tio bone
kaj eŭrope aranĝitajn institutojn kuracajn
hidropatiajn de doktoroj Dłuski, Havranek,
Chałubiński, ankoraŭ kelke da hoteloj, multe da
oportunaj pensionoj.

Koncerne la pitoreskecon, riĉecon, kaj sovaĝecon
de la naturo ne cedas Zakopane, sed eĉ superas
la disfamigitajn regionojn alpajn, ĝi estas do la
plej alloga

punkto de pola somera kaj vintra turismo.
Tamen antaŭ ne longa tempo, de post j. 1874
t. e. en momento kiam aperis Tatra Societo,
kiu havas celon „racie esplori Karpatojn kaj
Tatrojn kaj disvastigi la kolektitajn pri ili sciigojn,
akceladi la vizitadon ankaŭ pli faciligadi alvenon
al siaj membroj, esplorantoj de la naturo kaj
artistoj“, la turista movado disvolviĝas jam laŭ
plano.

Oni devas konstati, ke ĉi tiu societo plenumis
bonege sian taskon, konstruis vicon da montaj
rifuĝejoj, signis multe da vojetoj, kiuj kondukas
sur la pintojn kaj tenas en sia administrado
gvidistojn-montaranojn.

La Tatroj dividigas je Altaj granitaj kaj
Orientaj kalkŝtonaj.

Altaj Tatroj estas atingeblaj nur de bonaj
turistoj kaj estas vizitataj somere de junio,
ĝis oktobro. La Orientaj precipe vintre sur
ski-veturiloj. Plej ofte estas vizitataj Morskie
Okno, kuŝanta meze de montoj ĉirkaŭita per
granitaj muroj Mieguszwieckie, Rysy kaj Żabie,
plie la belega valo en Tatroj, Kościeliska.

Unutagaj ekskursoj sur Giewont, Czerwone
Wierchy, Świnica, Krzyżne tra Zawrat ĝis
Morskie Okno, el kiu la lasta estas plej fama,
apartenas al la plej popularaj.

El kelketagaj ekskursoj estas atentindaj
Rysy, Gierlach, la plej alta Pinto Tatra (2663).

Neĝa kaj senventa vintro en Zakopane kiu
daŭras de 5—6 monatoj ebligis la disvolviĝon
de vintro sporto, kiel ankaŭ glit-kaj iski-veturado.

De la jaro 1907 la ski-veturado disvolviĝis
neatendite. Pli kaj pli multe da homoj iradas
en la montojn, jam multaj pintoj estas atingitaj.
Oni vizitas jam preskaŭ ĉiujn pintojn kaj konstruis
kelkajn rifuĝejojn. Por kontetigi la bezonojn de
amatoroj, kiuj veturas sur glitveturiloj, ĝis nun
perfektigantaj tian sporton sur deklivoj de
najbaraj montetoj, formiĝis societo por konstrui
specialan vojon „bobsleigh“ kiu en venonta jaro
estos fordonita al publika uzado.

Kiel mi antaŭe memorigis, Zakopane ne estas
nur sanigejo kaj turista stacio, sed ankaŭ lulilo
kaj fajrujo de zakopane'a stilo kaj ankaŭ
konstanta loĝejo de multaj literaturistoj kaj
artistoj, kiuj serĉas tie ĉi inspiron.

En Zakopane mem krom Muzeo de Chałubiński,
en kiu troviĝas multaj specimenoj de Tatra
faŭno kaj kreskajaro, Asocio „Kilim“, Metia
lernejo estas vizitindaj. Tamen la plej ĉefa
atrakto estas la Tatroj mem.

Konrad Sadowski.

UNIVERSALA ESPERANTIA
BIBLIOTEKO

Ekskurso al Zakopane.

Oni instste petas la Kongresanojn intencantajn partopreni en la ekskurso al Zakopane, ke ili bonvolu nepre kiel eble plej baldaŭ sciigi pri tio la Komitaton en la akceptejo. Oni starigis jenan provizoran programon: forveturo el Kraków je la 7 (sepa) horo matene alveno al Zakopane je la 11 (dekunua) antaŭtagmeze. Vespere je la 8-a horo okazos je la honoro de alvenintoj la rauto aranĝita de la S-o Dro Chramiec. Lunde kaj marde okazos ekskursoj en la Tatrajn montojn. La elspezojn por unu persono, enkalkulante la loĝejon, manĝaĵojn, veturilojn k. t. p. oni proksimume limigas je 20 kr. potaĝe krom la vojaĝ-bileto, kies prezo dependos de la nombro de portoprenantoj.

Aliĝu kiel eble plej rapide!

Pri la deveno l'arta muziko.

(Greka legendo).

En antikvaj tempoj, longe antaŭ Homero, vivis juna paŝtisto, kiu paŝtis siajn kaprinojn sur la herb-abundaj deklivoj de Parnaso. Por sin amuzi, li tranĉis kanon, boris en ĝi truetojn kaj ludis tre gracie sur tia fluto. Goje li invitis siajn amikojn, ke ili faru tion saman, ili tamen mokis lin.

„Ĝu ne sufiĉas al vi la kanto de la birdoj kaj la melodia voĉo de la junaj knabinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon? Sed la paŝtisteto ne cedis, kaj la junaj paŝtistoj el Parnaso demandis la saĝulojn en Grekujo. „Ho honorindaj saĝuloj“, ili parolis, „ĉu ebla estas arta muziko? La honorindaj saĝuloj meditis longe, longe karesis siajn belajn blankajn barbojn, fine tamen ili proklamis la orakolon: „Ne, junaj paŝtistoj, tia muziko estas necbla, ĉar ĝi neniam ekzistis; se ĝi estus ebla, ĝi estus nur sovaĝa mikso de sonoj, netorebla por ĉiu delikata orelo.“

Triumfante revenis la paŝtistetoj en sian montaron kaj denove mokis la tro inventeman kolegon. Li tamen estis obstina. Sen ĉagreno li tranĉis kanojn, kaj serĉese li invitis al ludado siajn konatojn. Fine ili konsentis kaj ankaŭ eldonis sonojn de eksterordinara beleco.....

Tiel naskiĝis la arta muziko. Ĝi ne superbruis la kanton de la birdoj, ĝi ne mutigis la melodian voĉon de la junaj knabinoj. Ĝi vivas malgraŭ vi, saĝuloj de Grekujo, kaj ĝi vivos tiel longe, kiel longe nur ekzistos art-amantoj.

Simile ankaŭ nia Esperanto ne detruos la naciajn lingvojn, kaj tamen ĝi vivos por la bono de l' homaro.

Dr. STANISLAV SCHULHOF.

ONI SERĈAS ATESTANTOJN.

Mi certe ne bezonas aserti, ke mi veturis al Krakovo, por partopreni la kongreson, sed tute ne, por ke mi serĉu iajn aventurojn.

Mi ne bezonas tion aserti, ĉar mi jam trapaŝis la limojn senkondiĉe necesajn por similaj delikataj aferoj, ĉar miaj printempoj estas multe pli nombraj ol la fingroj sur ambaŭ miaj manoj kaj piedoj, aĉ kune kun miaj haroj.

Sed tamen mi havis aventuron, je kiu mi estas tute senkulpa, kiu tute sen mia volo kaj intenco okazis, sed kiu, ho ve, povas efiki en mia familia vivo (mi estas

jam patro de familio). Ĝi estas vere stranga, kvankam mi ĝin devas kun honto konfesi, iomete agrabla afero, kiu min renkontis dum la kongreso, sed pro mia tuta posta vivo, kaj eĉ pro la bono de ĉiuj sen siaj edzinoj kongresantaj edzoj, mi serĉas atestantojn, kiuj povus, se ĝi estos necesa, atesti, ke mi estas je tio tute senkulpa.

Kio do okazis?

Tio estas tute simpla, sed tio estos tute certe al mia hejme restinta edzino tute malsimpla eĉ ne klarigebla fakto, kiel ĝi nur okazis.

Kaj si ĝin tute certe ekscios, kvankam mi, por nenio en la tuta mondo, ne montras al ŝi la „corpus delicti“, la fotografajon de nia sennombra kongreso dum kiun oni faris hodiaŭ matene ĉe kaj sur la deklivo de la nobla kaj malnova reĝa Wawelo.

Mi ĝin certe hejmen ne alportos, sed la fotografajoj estos publikigitaj en ĉiuj ilustritaj gazetoj kaj tie tuj en la plej unua vico ŝi ekkonos kaj ekvidos sian edzon, en stranga pozicio kuŝanta, ho ve, tre proksime ĉe unu bela en nacia kostumo vestita samideanino.

Tute same kiel mi, la senkulpa bela estaĵo devis sidigi sur la malsekan teron kaj tiamaniere mi kuŝis apud ŝi, kvankam mi estis ambaŭ senkulpaj kiel la kolomboj.

Tute ne ŝatante la amasajn fotografajojn mi staris sole kaj aparte nur kun mia pola amiko kiam la granda malfeliĉo okazis.

Ho malbenita fotografisto!

Subite aperas antaŭ mi la stranga homo kaj kiel la armea komandanto krias, ho ne, kriegas en miajn orelojn — sidigu vin! Sidigu vin!

Mi volis ion diri, ion respondi, sed la malfeliĉulo jam min prenis kaj puŝis) Sidigu vin, sidigu vin!

Mi sidigis kaj mi eĉ ne rimarkis ke mi sidas en la plej unua vico kaj krom tio, ĉe unu juna, kaj ho ve, samtempe bela samideanino.

Estante tute malvarma por virinaj ĉarmoj mi ŝin preskaŭ ne rimarkis kaj lasis min libere treni de mia malfeliĉa sorto.

Mi ankoraŭ eĉ ne okupis la por mi difinitan lokon, kiam la aventuro ŝanĝiĝis en avanturegon. Al la stranga fotografisto ne sufiĉis, ke mi sidis. Alkurinte al mi, ree li komencis krii, kuŝigu vin kuŝigu vin kaj antaŭ ol mi povis oponi mi jam kuŝis. Ho ve kiel mi kuŝis!

Ĝe mia flanko ĉarma juna samideanino en nacia kostumo, — ne, ne ĝi ne estas ebla, mi volis protesti, mi volis forkuri, sed ne la fotografisto ekkrias — silentu, silentu! Kaj la tuta amaso, eĉ la strato kriis: Silentu, silentu!

Mi silentas, la aparato klapis kaj — ĉio estis jam finita.

Nun la bildo migros tra la tuta mondo, oni min vidos kaj ekkonos en suspekt-plena pozicio kaj nun al vi imagu kio okazos.

Pro tio, karaj gesamideanoj, kiuj staris en la malbenita momento en mia proksimo, mi vin sinerege petas, sciigu al mi viajn nomojn kaj viajn adresojn, por ke mi havu atestantojn, se la kongreso havos por mi malagrablajn sekvojn.

Mi serĉas eĉ la adreson de mia ĉarma najbarino, por ke ŝi atestu, ke mi ĉe ŝi kuŝis kiel ia malviva aĵo, kaj ke mi estis eĉ tiom maldelikata kaj min al si eĉ ne prezentis. Mi nune loĝas en Lubiez str. N-r. 22 kaj poste en Pardubice Bohemujo, se mi ankoraŭ viva de la kongreso revenos.

GRIĈJO.

Rakonto de Ĝehov.

Griĉjo, malgrandeta knabo, naskiĝinta antaŭ du jaroj kaj ok monatoj, promen

kun vartistino sur bulvarado. Li estas vestita per longa vata palteto, skarpo, granda ĉapo kaj varmaj galoŝoj. Al li estas sufoke kaj varmege, kaj la aprila suno brilas rekte en liajn okulojn kaj pinĉas la palpebrojn. Tuta lia figuro, mallerta kaj timeme paŝanta, esprimas ekstreman nekomprendadon.

Ĝis nun Griĉjo konis nur unu kvarangulan mondon, kie en unu angulo staris lia lito, en alia — vartistina kesto, en tria — seĝo, en kvara — brulas lampeto antaŭ sanktfiguroj. Se oni rigardas sub liton, oni vidas pupon kun forompita mano kaj tamburon: post la vartistina kesto estas multo da diversaj aĵoj: fadenbobenoj, paperetoj, skatolo sen kovrilo, disrompita erlekenpupo. En tiu-ĉi mondo krom vartistino kaj Griĉjo ofte estas panjo kaj kato. Panjo similas pupon kaj la kato — paĉjan pelton, nur la pelto ne havas okulojn kaj voston. El mondo, kiu nomiĝas infancambro, la pordo kondukas en spacon, kie oni tagmanĝas kaj trinkas teon. Tie staras Griĉja seĝo sur altaj piedetoj kaj pendas murhorloĝo, ekzistanta nur por svingi pendolon kaj sonori. El mangoĉombro oni povas trairi en ĉambron, kie staras ruĝaj brakseĝoj. Tie sur tapiŝo estas malhela makulo, pro kiu oni minacas per fingro al Griĉjo eĉ ĝis nun. Post tiu-ĉi ĉambro estas ankoraŭ alia, kien oni ne permesas eniri kaj kie montretiĝas paĉjo, persono tute enigma! La vartistino kaj panjo estas kompreneblaj: ili vestas Griĉjon, nutras kaj kuŝigas lin dormi sed por kio ekzistas paĉjo — estas tute nekonate. Ekzistas ankaŭ alia enigma persono — tio estas onklino, kiu donacis al Griĉjo tamburon. Ŝi jen aperas, jen malaperas. Kien ŝi malaperas? Griĉjo ne unu fojon rigardadis sub la liton, post la keston, sub kanapon, sed ŝi ne estis tie...

En tiu-ĉi nova mondo, kie la suno dolorigas okulojn, tiom estas da paĉjoj, panjoj, onklinoj, ke eĉ vi ne scias, al kiu alkuri. Sed kio estas plej stranga kaj sen-senca, tio estas ĉevaloj. Griĉjo rigardas iliajn moviĝantaj piedojn kaj povas nenion kompreni. Li rigardas vartistinon, por ke ŝi solvu lian nekomprendadon, sed ŝi silentas.

Subite li aŭdas teruran piedfrapadon... Laŭ la bulvarado moviĝas rekte sur la amaso da soldatoj, egalmesure paŝantaj, kun ruĝaj vizagoj kaj kun betulaj vaporbanaj branĉfaskoj sub brakoj. Griĉjo tuta malvarmiĝas pro timo kaj demande rigardas la vartistinon: ĉu tio estas danĝera? Sed la vartistino ne forkuras kaj ne ploras; do tio ne estas danĝera. Griĉjo akompanas la soldatojn per okuloj kaj mem komencas paŝadi takte.

Bulvardon trakuras du grandaj katoj kun longaj vizagegoj, kun elstarigitaj langoj kaj suprenlevitaj vosto. Griĉjo opinias, ke al li ankaŭ necesas kuri kaj kuras post katoj.

Haltu! krias al li la vartistino, malgentile kaptante lin je ŝultroj. — Kien vi? Ĉu oni ordonis al vi petoli?

Jen ia vartistino sidas kaj tenas malgrandan trogon kun oranĝoj. Griĉjo preteriras kaj silente plenas unu oranĝon.

Nu, por kio vi prenas? krias lia vartistino, batante lin je mano kaj fortprenante oranĝon. — Malsaĝulo!

Nun Griĉjo kun plezuro levprenus vitreton, kiu kuŝas sub piedoj kaj brilas kiel lampeto, sed li timas, ke oni denove batos lin je mano!

Mian respekton! aŭdas subite Griĉjo preskaŭ super la orelo mem ies laŭtan basan voĉon kaj vidas altkreskan homon kun helaj butonoj. Por lia granda pleziro tiu-ĉi homo premas al la vartistino la manon, haltas kun ŝi kaj ekparolas. La brilo de suno, la bruo de veturiloj, ĉevaloj, helaj butonoj, ĉio tio-ĉi estas tiel frapante nova kaj ne terura, ke la animo de

Griĉjo pleniĝas per sento de ĝuo, kaj li komencas ridegi.

Iru, iru! li krias al la homo kun helaj butonoj, tirante lin je vesto.

Kien iri? demandas la homo.

Iru! persistas Griĉjo.

Li volas diri, ke estas bone ankaŭ preni kun si panjon, katon, paĉjon, sed la lango diras tute ne tion, kio necesas.

Post mallonga tempo, la vartistino flankeniras de la bulvardo kaj enkondukas Griĉjon en grandan korton, kie ankoraŭ kuŝas neĝo. Kaj la homo kun helaj butonoj ankaŭ iras kun ili. Ili preterpasas zorgeme neĝamasojn kaj ŝlimakvojn, poste laŭ kota malluma ŝtuparo eniras ĉambro. Tie estas multo da fumo, odoras rostaĵo, kaj ia virino staras apud forno kaj rostas kotletojn. La kuirstino kaj la vartistino interkisas kaj kune kun la homo sidigas sur benkon kaj nelaŭte ekparolas. Al Griĉjo, varme vestita, fariĝas netolereble varmege kaj sufoke.

Pro kio estas tio? pensas li ĉirkaŭrigardante. Li vidas malhelan plafonon, fornan forkon kun du kornoj, fornon, kiu elrigardas kvazaŭ granda nigra kaverno.

Panjo, panjo! Li tiras vartistinon.

Nu, nu, nu! Krias la vartistino. — Atendu!

La kuirstino starigas sur tablon botelon, du glasetojn kaj kukon. Du virinoj kaj la homo kun helaj butonoj interfrapas glasetojn kaj trinkas kelkfoje kaj la homo ĉirkaŭprenas jen la vartistinon, jen la kuirstinon. Kaj poste ĉiuj tri komencas ne laŭte kanti.

Griĉjo sin tiras al kuko, kaj oni donas al li peceton. Li manĝas kaj rigardas, kiel trinkas la vartistino. Li ankaŭ volas trinki.

Donu! vartistino, donu! li petas.

La kuirstino donas al li ekstrinki el sia glareto. Li elstarigas okulojn, sulkigas vizaĝon, tusas kaj poste longan tempon svingas manojn; kaj la kuirstino rigardas lin kaj ridas.

Reveninte hejmen, Griĉjo komencas rakonti al panjo, al la muroj, al la lito, kie li estis kaj kion li vidis. Li diras ne tion per lango, kiom per vizaĝo kaj manoj. Li montras kiel brilas la suno, kiel kuras la ĉevaloj, kiel elrigardas la terura forno, kiel trinkas la kuirstino . . .

Vespere li neniel povas ekdormi. La soldatoj kun branĉfaskoj, la grandaj katoj, la ĉevaloj, la vitreto, la trogo kun oranĝoj, la helaj butonoj — ĉio tio-ĉi amase kolektiĝis kaj premas lian cerbon. Li sin turnas de unu flanko al alia, babilas kaj fine, ne povante plu toleri sian eksektiĝon, esploras.

Vi havas febron! diras panjo, tuŝante per manplato lian frunton. — Pro kio tio povis okazi?

Forno! ploras Griĉjo. — Foriru de tie-ĉi, forno!

Kredeble, li tromanĝis . . . decidas panjo, kaj Griĉjo, disŝirata de impresoj de nova ĵus elprovita vivo, ricevas de panjo kuleron da ricina oleo.

El rusa lingvo tradukis
Dro N. Kabanov. L. K. (Rusujo).

„Mazepa“ esperante.

Je la nomo de ĉiuj Gesamideanoj ni dankas plej kore la Geartistojn.

L. Kronenberg.

Ĉiuj vegeteranaĵ gesamideanoj devas manĝi en la

**UNIKA VEGETARANA
MANĜEJO**

„PRZYRODA“

ŝtrato Krzyża 7 Krakovo.

LOKA KRONIKO.

Gesamideanoj! Memoru, ke oficiala fotografiisto de la Oka estas Vladislavo Gargul (adreso: Bochnia, Galicio, Aŭstrio), kiu estas preta sendi al Vi ĉe post la

la kongresanoj 5-10

bone siajn devojn.

Internacia Ligo de Esperantaj Poŝtoficejoj (Idepo) havis sian duan kunsidon merkrede la 14-an je la 2 posttagmeze. Ceestis la reprezentantoj de 5 nacioj. La prezidanto A. Behrendt el Breslau raportas pri la diskutoj de la unua kunsido kaj komunikas, ke la protokolo estos publikigata en la kongresa bulteno.

Ĝar oni devas elekti la prezidanton por la sekvonta jaro, la nuna prezidanto proponas, ke oni reelektu lin: li opinias, ke la parto de la laboro, farota de li, ankoraŭ ne estas finita; sekve li deziras resti sur sia posteno. Unuanime oni konsentas.

La dua punkto de la tagordo. Kvankam la nuna ne sufiĉas, kaj ankaŭ jam ne sufiĉis, la prezidanto opinias, ke ne estas rekomendinde ŝanĝi la regularon aŭ starigi novan. La lasta jaro montris, ke kaj kiel oni laboras ĉe havante ne taŭgan regularon. Plue-ĉar diversaj aferoj, ekzemple la membreco de naciaj asocioj aŭ grupoj, ankoraŭ ne estas sufiĉe diskutitaj kaj praktike provitaj, oni konsentas prokrasti revizion de la regularo. La prezidanto asertas, ke li demandas ĉiam la opinion de la diversaj estraroj de naciaj asocioj, kaj ke li konsideros la prezidantojn de la naciaj poŝtligoj aŭ kiel anojn de Idepo estraro. Oni aprobas tian agmanieron.

Plue la prezidanto kiel redaktoro de „Poŝta Esperantisto“ petas pri kunlaboro tiel en la kvarlingva vortaro kiel en la alia parto de l' ĵurnalo.

Kun reciprokaj bondeziroj kaj dankovortoj oni adiaŭas unu la alian, post kiam la prezidanto speciale laudaprobis la oranĝon de la kongresa poŝtoŝicejo, kiu tre kontentige funkcias. La kunsido estas formita je la 3 posttagmeze.

Informa klarigo. Pro rapido oni notis, ke la Popolkantojn, kantitajn dum la Ju-

bilea festvespero verkis Moniuszko, anstataŭ Gall, kiu harmoniigis tiujn ĉi kantojn.

La ĥoron direktadis S-ro W. Barabasz, prof. de la Krakova muzika konservatorio.

Kiu forprenis Inkoplumon el la Skriboĉambo bonvolu redoni ĝin al la Sekretariejo.

Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj. Sub prezido de S-ro de Wierzchowski, imp. reĝa senatano, la ĝenerala Kunveno okazis lundon 12-an. Oni aŭdis la raporton de la Ĝenerala Sekretario S-ro Degon. Hodiaŭ 14-an okazis dua kunsido dum kiu oni elektis kiel prezidanto, por anstataŭi S-ro Blott, S-ro de Wierzchowski, jam vic-prezidanto por Aŭstrio. Oni pritraktis diversajn temojn precipe pri la rilatoj kun la centra oficejo de internaciaj asocioj en Bruselo, kies la organo „Vivo internacia“ estos resume represita a la Revuo, per la zorgoj de nia societo. — Oni decidis ke okazos vendredon tua labora kunsido, je la dua, en la sama loko.

La saman tagon je la unua, la Juristoj kunvenos, en la kafejo Bisanz, 2 Karmelicka Str. Estas petataj siujoroj kaj frandinoj honorigi la kunvenon por sia ĉeesto.

Grava avizo. Oni petas ĉiujn kongresanojn partoprenantajn en la ekskurso al Zakopane, ke ili banvolu arigi sabate antaŭtagmeze je la 12 horo en la akceptejo, por ekscii la detalajn de la ekskurso.

Al ĉiuj gesamideanoj ni rekomendas en Zakopane la firmon de Z. Rembowski, provizitan por ĉiuj turistoj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista. Merkrede je la 2a posttagmeze okazis la unua kunveno de la anoj de la I. Scienca A. F.

Fine So Bujvid invitis la anon de la S. A. ĉeesti paroladon kaj montradon de aparato por likvidi la aeron, de So Wladyslaw Grodzicki, kiu okazos vendredon, je la 10a matene, Radziwilowska 4 proksime de la stacidomo, ĉambro de kuracistoj. —

— La 2a kunsido okazos sabate, je la 11a matene.

Paroladoj. Morgaŭ je 5 okazos en Malnova Teatro parolado de Sano Devjatin konata verkisto esperanta kaj L. Komitatano je la temo „Parkurbo Esperanto“. Pri la sama temo parolos poste Sano Leopold Schlaf, komerca direktoro de la „Parkurbo Esperanto.“; So D-ro Kandt el Bromberg kaj la ĝen. sekr. de U. E. A. Sano Fleck. La temo interesigos certe ĉiujn gesamideanojn. La entrepreno estas tute serioza, ĉar ĝi posedas jam nun la kapitalon de 2,000,000 da markoj. Centra oficejo en Munĥeno estis jam vizitita de multaj konataj esperantistoj, kiuj ĉion tre laudas.

IIIa Kongreso de U. E. A. La nua labora kunsido de V. E. A. okazis merkrede matene en aparta ĉambro de la Komerca Akademio sub prezido de S-ro Mudie. Post egalo de financa raporto de S-ro Stettler, financa fakestro, diskutiĝis la demando pri plialtigo de la jara kotizaĵo. Ĉar ĉiuj konsentis, ke la servoj de Esperantio valoras certe pli ol duono da spesmilo, dezi-

resprimo estis alprenata ke la jara kotizaĵo estu proksiman jaron je 1 Spesmiĵo.

Proksima kunsido okazos vendredon matene je la 9a horo precize en la ĉambro de la Komercia Akademio rezervita al V. E. A. Ĉuj Esperantianoj bonvolu aĉeti en la Kongresa Oficejo de V. E. A. la Kongreskarton.

L. Poncet.

Esperantia karavono el Kraków. U. E. A. komisiis Srojn Générmont (sub del. en Paris (kaj Poncet (kons. en Lyon), por organizi Esperantian karavanon el Kraków al German-Lando Svislando kaj Franclando, kun vizito de la urboj Praha, Dresden kaj Nürnberg. Polveturo el Kraków dimanĉon vespere je la 7a h. 44. Minimuma prezo: 60 Spesmiĵoj ĝis Lyon. Precizajn prezojn al ĉiuj urboj, kaj detalan programon konigos Sro Poncet sabaton matene je la 10a h. ½ tuj post la finiĝo de la kunsido de U. E. A. en sama ĉambro. Aligoj estos akceptataj ĝis sabato tagmeze; sin turni al la Oficejo de U. E. A. en aparta ĉambro de la Komercia Akademio.

Du Napoleonoj. Dem: Kia estas la diferenco inter Napoleono la 1a kaj Napoleono la VIIIa? Resp.: Napoleono la venkis la popolojn de Eŭropo; Napoleono la VIIIa venkis la popolojn de la tuta mondo.

H. Hurter.

Kunsidoj de T. E. K. A-anoj dum Oka. La 12-an, 14-an kaj 15-an de Augusto en belega Salono de Krakova kuracista Asocio okazis kunsidoj de membroj de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, alie nomata simple TEKA. Krom multnombraj polaj esperantistaj kuracistoj (in-

son-Johnston (Dublin), D-ro G. Johnston (Londono) kaj D-ro Rothschild (Aachen), kies celo estos klopodi, ke dum estontjara XVII Internacia Kuracista Kongreso en Londono Esperanto havu en ĉiuj sekcioj la samajn rajtojn, kiel ĝisnunaj oficialaj lingvoj de kongresoj. Poste dum la dua kaj tria kunsido okazis pure sciencaj prelegoj de D-ro Sós el Wien (Novaj metodoj en dentkuracado), D-ro Dubrowicz el Varsovio (pri salvansano) kaj D-ro Fišer el Tiflis (Pri eksterutera gravedo) kaj oni tralegis (pro foresto de aŭtoro) artikolon de D-ro Mosel el Svislando (Pri aktinomi-kozo). En postprelegaj diskutoj partoprenis multaj ĉeestantoj. Antaŭ fino de lasta kunsido oni petis Prof. Bujwid, ke li bonvolu esprimi al Krakova Kuracista Asocio en nomo de T. E. K. A. grandan dankon pro la afableco, dank' al kiu dum tuta kongreso estis disponebla al T. E. K. A. tiel bela kaj konvena apartamento. Post la kunsidoj oni fotografis ĉeestantojn apud la domo de Krakova Kuracista Societo.

Internacia bala

kovon la ĉeestantaro esprimis pro tio sian grandan bedaŭron kaj decidis sendi el prof. Dor telegrafe Siajn korajn bondezirojn de baldaŭna resamiĝo. Telegramojn al sendis ankaŭ D-ro Krikortz el Stockholm kaj Bohema Esperantista Unio. Laŭ la propono de la prezidanto ĉeestantoj ekstaris por honorigi memoron de tri mortintaj lastatempe T. E. K. A-anoj, nome de: D-ro Robin el Bukareŝto, D-ro Kunschert el Wiesbaden (Germanujo) kaj prof. Emmert el Bern (Svislando). Post la tralego de raportoj de sekretario de T. E. K. A., D-ro Rothschild el Aachen (Germanujo) kaj de kasisto, D-ro G. Johnston el Londono, unuanime akceptitaj, oni komencis diskuton pri la nova projekto de statuto (regulano) de T. E. K. A. kaj oni decidis, ke elektita dum la kunsido speciala komisiono, konsistanta el D-ro Chybezyński (Varsovio), D-ro Mikolajski (Lwów) kaj D-ro Šidlovskij (Moskvo) opiniu antaŭ Novjaro, kio en la projekto de Dro Chybezyński estas ŝanĝota. Poste komencis tre longedauraj, sed tamen la tutan tempon tre viglaj diskutoj de ĉeestantoj pri la organa atero. Rezulte oni elektis kiel ĉefredaktoron de organo de T. E. K. A. D-ro Chybezyński Polujo kaj oni decidis, ke en ĉiu lando estu starigotaj po una aŭ pli da kunredaktoroj, kies tasko estos kolekti bonan materialon en sia lando por la

De la Redakcio.

Hodiaŭa numero de la „Kongresa Bulteno“ estas la lasta. Fermante do nian kongresan gazeton ni dankas antaŭ ĉio plej kore ĉiujn niajn samodeanojn, kiuj nian gazeton volonte favoris. Ni dankas ankaŭ la redakcion de pola Krakova gazeto „Ilustrowany Kuryer codzienny“; kiu alodn adis nian „Bultenon“ el siaj abonantoj. Niscias, ke nia gazeto ne estis senerara, tamen senkulpigis tion al ni, karaj gesamideanoj, ĉar ni faris ĉion, kio nur estis ebla.

La Redakcio.

P. S. La kolekton de ĉiuj numeroj de la „Bulteno“ oni povos ricevi en la Redakcio str. Karmelicka 16. Krakovo.

Telegramoj el la Mondo.

El Hispanujo.

Strikoj en Hispanujo. (Madrido). La transportaj laboristoj komencos striki en la plej proksima dimanĉo. La striko de presistoj estas ankaŭ baldaŭ okazonta. La metalaj laboristoj kaj la komerca servistaro verŝajne proklamos strikon ĝeneralan.

La kelneroj en kafejoj hodiaŭ komencas striki. La masonaj labordonantoj rifuzis la intervenon de arbitracia juĝantaro.


Saragossa. La strikantoj certigas, ke la striko estas pure ekonomia.

El Francujo.

Miliona bankroto. (Parizo). La bankista firmo Poullvet en Aŭtin ĉesi elpigi. La depozito kalkuliĝas je 5 milionoj. Oni timas, ke tiu bankroto tiros post si tutan vicon da provincaj firmoj.

El la presejo kaj stereotipio de la fratoj E. kaj Dro K. Koziański, Kraków.

Krakova Tramo.



Anoncoj.

JAM APERIS UNUTAGAĴO

„Politika Malliberulo“

Priskribanta la vivkondiĉojn de politikaj malliberuloj en Rusujo.

Aĉetebla en librejo FR. EBERT
Krakovo str. Floryańska 35.

PREZO

KR. 0-60. ————— SM. 0-25.

I. kaj r. patento Nr. 41589.

Mirinda eltrovo por suferantaj je la hernio
Nov-eltrovita saniga

Hernia zoneto

apud kiu konsistanta el du partoj peloto ne surpremas hernian malfermaĵon, sekve ne elpremas inteston internen, kio povus kaŭzi diversajn intestajn suferojn, kiel okazadis ĉe la ĝisnunaj zonetoj. Ĝi kaŭzas bonan situacion de l'intestoj en la ventra kavo. Eĉ por la plej ekstrema sufero ĝi estas tre facilepeza, sen risorto aŭ metalo ĝi estas portata sen doloro kaj ĝi subtenas radikale. Oni sendas klarigon post ricevo de poŝtmarko; elsendo senprokrasta.

M. I. Kantorowicz,

Podgórze strato de Józefińska 6.

Filioj: Varsovioj, Sosnowice, Vieno.

Respondeca redaktisto: Maryan Dąbrowski.